

Enhavo

1	Interlingvistiko/esperantologio kiel fako en universitatoj – spertoj el Leipzig (Sabine Fiedler)	2
1.1	Enkonduko.....	2
1.2.	La Eŭropa studreformo.....	3
1.2.1	Historio kaj celoj de la “Bologna Procezo”	3
1.2.2	La studreformo kiel ŝanco por la fako interlingvistiko	4
1.3	Prezento de la modulo “Universalaj lingvoj”	5
1.3.1	Strukturo kaj partoprenantoj.....	5
1.3.2	Enhavoj	5
1.3.3	Ekzamenaj rezultoj.....	7
1.3.4	Studenta pritaksado de la modulo.....	8
1.4	Konkludoj	9
1.5	Suplementoj	11
1.5.1	Suplemento A: Pri la ekzamenoj	11
1.5.2	Suplemento B: Pri la studentaj prijuĝoj	16
1.5.3	Suplemento C: Enketo	19
1.6	Menciita literaturo	25
2	Interlingvistikaj studoj en Poznano/Pollando (Ilona Koutny)	26
2.1	Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj jam dek jarojn	26
2.2	Riĉa kaj sukcesa interlingvistika sesio en UAM (01-09.02.2008)	27
3	Pri lingvo-inventado en la universitato de Greifswald	27
4	Denis Silagi (1912-2007) (Detlev Blanke).....	28
4.1	La interlingvisto	28
4.2	Ĉefaj verkoj	29
5	Claude Piron (1931-2008) (Detlev Blanke)	30
5.1	La homo	30
5.2	Publicaĵoj pri Esperanto kaj lingva komunikado.....	35
5.3	Aliaj publicaĵoj	35
6	Magomet Ismailoviĉ Isaev - 80-jara (Detlev Blanke)	35
7	Novaj kaj malnovaj libroj en la reto	36

1 Interlingvistiko/esperantologio kiel fako en universitatoj – spertoj el Leipzig

Sabine Fiedler

Dum vintra semestro 2007/2008 en la universitato de Leipzig (Germanio) okazis modulo kun la titolo „Universalaj lingvoj“. Ĝi estis iniciato de la germana Societo pri Interlingvistiko (*Gesellschaft für Interlinguistik e.V.*, *GIL*) kaj estis subvenciita de la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation (ESF)*.

Kiel respondeculo pri la projekto mi ĉi tie raportos pri miaj spertoj kun la modulo. Entute mi intencas trakti la sekvajn punktojn:

- 1 Enkonduko: Kial ni enkonduku interlingvistikon/esperantologion en universitatajn
- 2 programojn?
- 3 La Eŭropa studreformo
- 3.1 Historio kaj celoj de la “Bologna procezo”
- 3.2 La studreformo kiel ŝanco por la fako interlingvistiko
- 4 Prezento de la modulo “Universalaj lingvoj”
- 4.1 Strukturo kaj partoprenantoj
- 4.2 Enhavoj
- 4.3 Ekzamenaj rezultoj
- 4.4 Studenta pritaksado
- 5 Konkludoj
- 6 Suplementoj

1.1 Enkonduko: Kial ni enkonduku interlingvistikon/esperantologion en universitatajn programojn?

La ĝenerala opinio pri Esperanto kaj planlingvoj en la ekstera, t.e. ne-esperantista mondo ne estas pozitiva. Multaj homoj simple scias nenion pri la temo kaj ne trovas necese okupiĝi pri ĝi; aliaj dekomence rifuzas ĝin, ofte surbaze de antaŭjuĝoj. Tiu ĝenerala bildo laŭ mi pli-malpli ankaŭ ĝustas por apartenantoj de universitatoj, do por studentoj kaj instruistoj en la diversaj pozicioj.

Ekzistas tamen grupo da sciencistoj, kiuj serioze okupiĝis pri la temo, ĉu el lingvistika, lingvopolitika, ekonomia aŭ alia vidpunktoj, kaj venis al la konkludo, ke Esperanto estas bone funkcia lingvo kaj meritas atenton se temas pri la celo estigi egalrajtan internacian komunikadon. Nomoj, kiujn oni povas mencii en tiu kunteksto estas interalie *Ulrich Ammon*, *Rainer Arntz*, *Hans-Jürgen Mattusch*, *François Grin*. Eĉ tiuj, tamen, por la proksima estonteco, ne vidas realan ŝancon por Esperanto, interalie pro la kaŭzo ke planlingvoj havas malbonan reputacion en la ĝenerala publiko same kiel en sciencaj rondoj. Grin (2005: 7) parolas pri «fréquentes réactions de rejet à l’égard de l’espéranto». Ammon (1994: 11) pri ”a deep-seated aversion, be it justified or not, of large or at least influential parts of the European population against any artificial language”. La Esperanta lingvo-komunumo laŭ mi ne sufiĉe konscias pri tiu problemo. Necesas pli fortaj klopodoj serioze informi homojn pri la temo surbaze de sciencaj faktoj kaj nia agado antaŭ ĉio direktu sin al la junularo lernanta kaj studanta, al homoj kiuj post la studofino en siaj diversaj profesiaj fakoj multobligos kaj disvastigos la scion pri interlingvistikaj temoj, kiuj en la estonteco eble ludos rolon dum gravaj lingvopolitikaj decidoj. Grava paŝo sur tiu vojo estas establo de la fako Interlingvistiko/Esperantologio en la oficialaj strukturoj de edukado kaj esplorado en universitatoj kaj altlernejoj. Tiamaniere oni havos la eblecon fake eduki studentojn pri interlingvistiko kaj samtempe plialtigi la reputacion de la fako en sciencaj rondoj.

Ekzistas jam menciindaj sukcesoj kaj spertoj sur tiu tereno, sed nur malmultaj. Konataj estas la fako “Esperanto – lingvo kaj literaturo” en la Budapeŝta universitato ELTE, la sola plenfunkcia kazo kun studofina diplomo, la ekstera profesoreco ĉe la Universitato de Amsterdamo kaj la postdiplomaj studoj, kiujn ofertas la Universitato Mickiewicz en Poznano. Krome en kelkaj universitatoj oni proponas prelegojn pri interlingvistiko aŭ Esperanto-kursojn.

Danke al la kompilado de Germain Pirlot ni scias, ke en 2007/08 okazis 68 Esperanto-kursoj, kiuj estis oficiale organizitaj en universitatoj kaj altlernejoj en 24 landoj (Aŭstrio: 1, Belgio: 1, Brazilo: 3, Bulgario: 1, Ĉeĥio: 2, Ĉinio: 18, Germanio: 2, Hispanio: 2, Hungario: 2, Italio: 2, Japanio: 7, Korea Resp.: 3, Kostariko: 3, Kubo: 1, Litovio: 2, Meksiko: 1, Nederlando: 1, Pollando: 3, Rusio: 5, Slovenio: 1, Svedio: 1, Ukrainio: 1, Usono: 4, Venezuelo: 1).

Inter tiuj estas kaj pure lingvaj kursoj kaj kombinaĵoj el Esperanto-kurso kaj enkonduko al interlingvistiko. La Amsterdama konferenco dediĉita al agado en universitatoj (en Julio 2008) certe donos la eblecon pli detale konatiĝi kun kelkaj el tiuj iniciatoj aŭ aŭskulti pri novaj.

1.2 La Eŭropa studreformo

1.2.1 Historio kaj celoj de la “Bologna procezo”

La fono de la iniciato en la Universitato de Leipzig estas la ŝanĝiĝantaj strukturoj en Eŭropuniaj universitatoj, konataj kiel Eŭropa studreformo aŭ t.n. *Bologna procezo*. La nomo originas el la “Komuna Deklaracio de Eŭropaj Ministroj pri Edukado de la 19-a de junio 1999” en Bologna. Jam antaŭe, en 1998, la ministroj pri edukado de Francio, Germanio, Italio kaj Britio subskribis la Sorbonne-Deklaracion, kiu formulis la sekvajn celojn:

- subteni moveblecon
- subteni labormerkatalitan kvalifikadon
- atingi pli grandan kompareblecon de universitataj sistemoj
- plibonigi la internacian konkurenceblecon de la Eŭropa universitata sistemo.

Intertempe 46 Eŭropaj ŝtatoj partoprenas la studreformon. Iliaj ministroj pri edukado renkontiĝas ĉiun duan jaron por preparoli problemojn kaj rezultojn. Tiel okazis post Bologno en 2001 en Prago, en 2003 en Berlino, en 2005 en Bergen, en 2007 okazos konferenco en Londono kaj en 2009 en Leuven. En Germanio oni havas la celon fini la enkondukon de la novaj programoj kaj universitataj gradoj (*Bachelor* kaj *Master*) en 2010.

La grado Bachelor en la nova ŝtuparforma studsistemo estos la regula grado de universitata studo, kiu konduku la plejmulton da studentoj al profesia laboro. Bachelor-studado ĝenerale koncentriĝas sur unu kerna fako, sed eblas kombini tiun kun aliaj fakoj. Ĝi daŭras 6 ĝis 8 semestrojn. Dum tiu regula studotempo oni akiras 180 ĝis 240 poentojn, la t.n. ECTS-poentojn (laŭ la *European Credit Transfer System*).

Master estas rigardata kiel daŭriga profesiokvalifika grado. Ĝi havas almenaŭ la fakan kaj scian nivelon de la ĝisnuna grado Diploma. Master-studado ĝenerale daŭras 2 ĝis 4 semestrojn, dum kiuj oni akiras 60 ĝis 120 poentojn. Tio signifas, ke la tuta regula studotempo en la sinsekva Bachelor-Master-sistemo maksimume sumiĝas je 5 jaroj.

	Daŭro	Poentoj
1-a ciklo (Bachelor)	6-8 semestroj	180-240
2-a ciklo (Master)	2-4	60-120

Studo konsistas el moduloj. Modulo estas lernunuoj, kiu kunigas rilatajn temojn de fakoj. Modulo unuigas diversajn formojn de lernado kaj instruado (ekz. prelegon, seminarion, ekzercon, staĝon) kaj parton de memstudo. Laŭplane moduloj estas kompareblaj kaj egalvaloraj en diversaj universitatoj. Al ĉiu modulo estas asignataj poentoj, ĉiu modulo finiĝas per ekzamenoj. Ekzamenoj akompanas la tutan studon. Kontinua lernoŝarĝo kondukas al pli alta lernefikeco.

Jen ekzemplo de modulo:

Modulo x (10 poentoj)		
Formo de instruado:	Formo de ekzameno:	Noto: aritmetika meznumero el la notoj de ĉiuj ekzamenoj
- prelego	- skriba testo	10 poentoj por la tuta modulo, se la noto estas almenaŭ 4 (= sukcesa trapaso)
- seminario	- referaĵo	
- ekzerco	- eseo (hejme skribita)	
	- parola ekzameno	

Ne ĉiu bonvenigas la Bolognan procezon. Kaj el studentaj rondoj kaj flanke de universitataj respondeculoj oni aŭdas kritikojn. Ili koncernas aŭ la tutan reformon aŭ unuopajn aspektojn kaj formojn de ĝia realigado. Ĉefa kritika punkto estas la fakto, ke la novaj reduktitaj studprogramoj kondukas al malpli alta nivelo de universitata kvalifiko, ke studentoj pro la rigidaj kaj lernejosimilaj planoj apenaŭ havas la ŝancon evoluigi kaj sekvi proprajn sciencajn interesojn kaj fokusojn. La edukaj celoj en la senco la Humboldt-a idealo estis anstataŭigataj per celoj kiel profesia uzokapablo (*employability*) kaj surlabormarkata kvalifiko. Krome, el premoj ĉe la realigado de diversaj normoj rezultas, ke dezirataj avantaĝoj, kiel movebleco kaj plimallongigo de la studotempo apenaŭ eblas. Ekzemple, ege malfacilas plani restadon en eksterlando dum Bachelor-studo.

1.2.2 La studreformo kiel ŝanco por la fakoj interlingvistiko

Unuflanke, la Eŭropa studreformo kondukas al malpli bonaj kondiĉoj por fakoj kiel interlingvistiko/esperantologio. Antaŭe en universitatoj estis ĉiam sufiĉe da tempo por fakultativaj programoj. Mi mem dum multaj jaroj de tempo al tempo ofertis prelegon pri interlingvistiko por studentoj de ĉiuj fakultatoj kaj neniam havis problemon trovi sufiĉe grandan nombron da studentoj, kiuj partoprenis ĝin aldone al siaj studprogramoj, simple pro intereso. Aliaj kolegoj en Germanio, membroj de GIL faris ion similan. La novaj streĉitaj studprogramoj vere ŝanĝas tiun situacion. Oni nun havas kadrajn instrutempojn (t.n. *timeslots*) inter 7.15 matene kaj 20.45 vespere kaj la studentoj havas ekzamenojn post ĉiu semestro. Oni ne atendu, ke ili serĉas aldonajn instruprogramojn por kiuj ili ne povas akiri poentojn.

Aliflanke – ĉiu ŝanĝiĝanta situacio ja ankaŭ alportas pozitivajn flankojn – la studreformo malfermas novajn pordojn, nome per fakosendependaj interdisciplinaj programoj. Tiuj elektele-devigaj moduloj permesu enrigardon en aliajn fakojn. Ili helpu eviti ke studentoj evoluigas t.n. tunelorigardon limigitan nur je la propra fakoj. La nomo de tiuj moduloj en la Leipziga universitato estas “Schlüsselqualifikation” (ŝlosilkvalifiko). Por ili studentoj ricevas same 10 poentojn kiel por modulo en siaj propraj fakoj. Dum la vintra semestro 2007/2008 en Leipzig la sekvaj moduloj estis partoj de la programo:

- Aktuelle Fragen der Lebenswissenschaften – Teil 1 (‘Aktualaj demandoj de vivosciencoj – parto 1’)
- Kulturen Asiens und Afrikas (‘Afrikaj kaj aziaj kulturoj’)
- Einführung in das Recht und die Rechtswissenschaft (‘Enkonduko al juro kaj jurscienco’)
- Digitale Informationsverarbeitung (‘Diĝita informprilaborado’)
- Interkulturelle Kommunikation (‘interkultura komunikado’)
- Literarisches Schreiben (‘Literatura verkado’)

- Energie und Umwelt („Energio kaj medio“)
- Politik – Rhetorik – Philosophie („Politiko, retoriko, filozofio“)
- Technik und Gesellschaft („Tekniko kaj socio“)
- Körper im Kontext von Leistung, Gesundheit und Geschlecht („Korpo en la kunteksto de kapablo, sano kaj sekso“)
- Geschichte und Theologie des Christentums („Historio kaj teologio de kristanismo“)
- Einführung in die Wirtschaftswissenschaften („Enkonduko al ekonomiko“)
- Genderkompetenz („Kompetenteco ĉe la traktado de seksoj en la socio“)
- Universalsprachen („Universalaj lingvoj“)
- Ethische Probleme wissenschaftlichen Fortschritts („Etikaj problemoj de scienca progreso“)

1.3 Prezento de la modulo „Universalaj lingvoj“

1.3.1 Strukturo kaj partoprenantoj

La modulo, kiel la plej multaj el la supre listigitaj “ŝlosilkvalifikoj” konsistas el 6 instruhoroj ĉiusemajne plus memstudado. Ĝin do konsistigas 90-minuta prelego, 90-minuta seminario kaj 90-minuta ekzerco (lingvokurso Esperanto). La tuta laborkvanto (*workload*) sumiĝas je 300 horoj, kaj la studentoj povas akiri 10 poentojn.

Prelego	Seminario	Ekzerco (Esperanto-kurso)
2 instruhoroj (= 30 horoj ĉeesto + 50 horoj memstudado)	2 instruhoroj (= 30 horoj ĉeesto + 80 horoj memstudado)	2 instruhoroj (= 30 horoj ĉeesto + 80 horoj memstudado)
Merkrede 7.15-8.45 h	Ĵaŭde 17.15-18.45 h	Lunde 7.15-8.45 h

La intereso pri la temo estis dekomence sufiĉe granda. Entute 112 studentoj montris sian deziron partopreni. Inter tiuj estis nur 3 el natursciencaj fakoj, ĉiuj aliaj strebis al la grado *Bachelor of Art (B.A.)*. Tiu nombro tamen nenion diras pri la fakta nombro de partoprenantoj, ĉar laŭ la sufiĉe komplikaj manieroj de registrado ĉe la Leipziga Universitato studentoj rajtas enskribiĝi por pluraj moduloj samtempe. Finfine 36 personoj fakte komencis la modolon, post la unuaj du semajnoj, dum kiuj studentoj rajtas novorientiĝi kaj ŝanĝi kursojn, restis 33. La partoprenantoj ĉefe reprezentis la sekvajn studofakojn: Anglistiko, Amerikaj Studoj, Germana kiel Fremdlingvo, Edukaj Sciencoj, Lingvistiko kaj Tradukado. Estontajn instruistojn oni bedaŭrinde ne atingas per tiu modulo, ĉar iliaj programoj ne enhavas “ŝlosilkvalifikojn”. La prelegon, kiu estis malferma por ĉiuj studentoj (ekzemple jenaj el malnovaj studprogramoj) partoprenis proks. 60 personoj (inter tiuj ankaŭ estontaj instruistoj).

1.3.2 Enhavoj

La enhavo de la **prelego(j)** estis la sekva (la vintra semestro 2007/2008 havis merkrede 13 semajnojn). La lingvo de instruado estis la germana:

- (1) Enkonduko: Superrigardo pri la enhavoj de la prelego kaj de la aliaj partoj de la modulo
 - (2) Internacia lingva komunikado
 - Multlingveco de la homaro – malbeno aŭ beno?
 - Regantaj lingvoj en la pasinteco
 - Ĉefaj lingvoj en la nuntempo: La rolo de la angla
 - Linguae francae
 - Tiel nomataj ‘grandaj’ kaj ‘malgrandaj’ lingvoj
 - Lingva pejzaĝo en Eŭropo (aktualaj problemoj en la Eŭropa Unio, kompare kun lingvopolitikaj strukturoj en UNO)
- Rezulte: La difino de “lingvaj problemoj”

- (3) Eblaj vojoj por solvi lingvajn problemojn:
- permaŝina tradukado
 - “English only”
 - “najbaraj lingvoj en Eŭropo”
 - EuroCom
 - ELF (English as a lingua franca)
 - *Planlingvo*
 - Difinoj planlingvo, interlingvistiko
 - Rilato inter lingvoplanado kaj planlingvo
 - Dueco artefariteco – natureco
- (4) Ĉefaj motivoj de la kreo de planlingvaj projektoj
- 1 Lingvo-filozofiaj/lingvistikaj motivoj (ekz. lingva relativismo)
 - 2 Komunikad-politikaj motivoj (ekz. humanisma strebado, imperiismo)
 - 3 Inventemo (luda funkcio de la lingvo)
- (5) Klasifikoj de planlingvaj projektoj:
- Pasilalioj/pasigrafioj
 - Aprioraj/aposterioraj projektoj
 - Laŭ historiaj etapo
 - Laŭ komunika aplikado
- (6) La miksita (apriora/aposteriora) planlingvo Volapük:
- fondinto
 - historio
 - strukturo
 - aplikado
- (7) Aposterioraj projektoj:
- karakterizo de aŭtonomaj kaj naturalismaj projektoj, modifitaj etnaj lingvoj
 - Ido (historio, strukturo, aplikado)
- (8) Aposterioraj naturalismaj projektoj:
- Occidental-Interlingue
 - Interlingua
- Modifitaj etnaj lingvoj
- Basic English
 - Latino sine flexione
- (9) Ekskurso (1-a parto):
- inventitaj lingvoj en sociaj utopiaĵoj, scienca fikcio kaj fantasta literaturo
 - (*J. Swift, G. Orwell, A. Huxley, A. Burgess*)
- (10) Ekskurso (2-a parto):
- la lingvoj kreitaj de *J.R.R. Tolkien*
 - la klingona
 - rilatoj al planlingvoj
- (11) Esperanto I:
- *L.L. Zamenhof*: vivo, motivoj, lingvistikaj kaj lingvopolitikaj konceptoj
 - lingva strukturo de Esperanto
- (12) Esperanto II:
- lingva strukturo el tipologia vidpunkto
 - aplikado (ekz. literaturo, faka uzo, Esperanto kiel gepatra lingvo)
 - la lingva komunumo
 - influoj de Esperanto al lingvistika pensado
- (13) Ekzameno

La **seminario(j)** donis la eblecon pli intense okupiĝi pri unuopaj aspektoj el la prelego. Studentoj aktive partoprenis per prelegetoj (20-minutaj) aŭ per prezentado de memelektitaj projektoj. La temoj de la prelegetoj estis interalie:

rilate al la seminaria fokuso lingvopolitiko:

- La internacia disvastigo de la angla lingvo
- “Linguistic Imperialism”
- ekonomiaj aspektoj de la lingva problemaro
- La modelo *ELF* (*English as a Lingua Franca*)
- EUROCOM – ĉu ŝanco por multlingveco?
- Lingvoplanado en Irlando
- Problemoj de permaŝina tradukado
-

rilate al la seminaria fokuso planlingvoj kaj planlingvaj projektoj:

- La Langue Bleue (L. Bollack)
- Ernst Beermann
- Wilhelm Ostwald
- Kiu parolas la klingonan?
- Lingvaj projektoj en la reto
- La persekuto de esperantistoj sub Stalin kaj Hitler

Kelkaj studentoj ne prelegis dum la seminarioj, sed preferis memstare prilabori memelektitan taskon. Inter tiuj estis

- (1) studado de la libro *Universalaj Lingvoj en Svislando* de Andreas Künzli (2006) kaj informado de la aliaj studentoj pri ĉefaj enhavoj de la libro. Ekzemplero de la libro estis donace transdonita al la Leipziga Universitata Biblioteko.
- (2) perdemandila enketo pri internacia komunikado. La rezultoj de tiu interesa studo troviĝas en suplemento C (1.5.3, p. 19-25).

Tiuj du ekzemploj montras, ke enkadre de la seminarioj studentoj kapablas memstare sekvi esplortaskojn, kiujn eble poste ili povus daŭrigi en pli ampleksaj formoj.

La **ekzerco(j)** havis la formon de Esperanto-kurso. La lingvon instruis *Alida Kaplick*, kiu posedas spertojn pri la instruado de Esperanto ekz. el la Leipziga Popolaltlernejo (*Volkshochschule*), surbaze de la materialo *Esperanto. Lernolibro de la Internacia Lingvo* (la Zagreba Metodo, Maribor 1995). Grupo da studentoj lernis memstare per la reta kurso de la *Germana Esperanto-Junularo*.

Origine la planado enhavis la inviton de kelkaj gastprelegantoj al prelegoj aŭ seminarioj (ekz. el la rondo de la *GIL*-membraro) por informi studentojn pri specialaj temoj de interlingvistika esplorado kaj por montri kiom riĉa kaj varia tiu estas. Tion mi ne povis realigi ĉefe pro tempomanko: Pro kalendaraj festotago ni havis nur 13 prelegojn (anstataŭ 15); la seminarioj estis plenŝtopitaj per studentaj prezentadoj, ĉar ĉiu bezonis noton por buŝa laboro.

1.3.3 Ekzamenaj rezultoj

La ekzamenaj formoj por la modulo “ŝlosilkvalifiko” devas plenumi certajn kondiĉojn. La enhavoj de ĉiuj tri instrueroj (prelego, seminario, ekzerco) estu bazo de la ekzameno. La fina noto estas la

mez nombro el noto donata por ĉefe parola laboro (ekz. prelegeto) kaj de ĉefe skriba laboro. La konkretajn ekzamenajn taskojn decidas la instruistoj mem. Pro tio ĉiu studento ricevis noton por prelegeto farita dum la seminario aŭ por prezentado de rezultoj de projekto.

Per la skriba ekzameno estis kontrolitaj, unue, la praktikaj Esperanto-konoj kaj, due, la scioj pri interlingvistiko akiritaj dum la prelegoj kaj la seminarioj. La studentoj havis la taskon skribi leteron (de proks. 120 vortoj) pri unu aŭ pluraj el la sekvaj temoj:

- sinprezentado kaj esprimo de koresponddeziro
- familio
- hejmurbo/Leipzig
- vojaĝo.

Temis pri sufiĉe postulema, ĉar produktiva tasko, kiun la studentoj devis plenumi post nur unu semestro (26 instruhoroj). Tio klare montriĝas se oni komparas ĝin al la taskoj en ekzamenoj de etnaj lingvoj post tiu tempo. 30 studentoj sukcese trapasis la ekzamenon, kvankam kelkaj ricevis la plej malbonan noton 4,0. **Suplemento A** (1.5.1, p.11-16) enhavas ekzemplojn de tre bonaj kaj de tre malbona leteroj.

La dua tasko estis kritika traktado de pri-Esperanta gazetara teksto. La artikolo de Wolf Schneider "Nachruf aufs Esperanto" ('Nekrologo pri Esperanto') estis publikigita en n-ro 10/1994 de *Neue Zürcher Zeitung (Folio)* (vd. **suplementon A**). Ĝi estas neniiga karikaturo de Esperanto kiu baziĝas sur eraroj, falsaj informoj, trompantaj komparoj, duonveroj kaj eraraj prijuĝoj pro mankantaj konoj. Temas pri bedaŭrinda ekzemplo de aŭtoro, kiu esprimas siajn antaŭjuĝojn sen informi sin pri la temo, kio speciale ĉagrenas, ĉar la teksto laŭstile brilas kaj ĉar tiu aŭtoro estas konata kaj en sia fako altestimata personeco. La plejmulto inter la studentoj bone majstris la taskon apliki siajn sciojn pri interlingvistiko kaj Esperanto por refuti la enhavon. **Suplemento A** enhavas kelkajn argumentojn el la plumo de la studentoj.


Entute 30 studentoj sukcese trapasis la ekzamenojn kun finaj notoj inter 1,3 kaj 3,3.

1.3.4 Studenta pritaksado de la modulo

De kelka tempo la Universitato de Leipzig uzas specialan elektronikan programon por la prijuĝo de instruado. Laŭ tiu dum la lastaj semajnoj de semestro studentoj estas invitataj respondi demandojn pri la kvalito de unuopa kurso aŭ tuta modulo.

Pro la speciala pionira karaktero de la modulo la opinioj de la partoprenantoj tre gravas. La avaraĝa nombro de studentoj (por la tri instrueroj kaj la tuta modulo), kiu respondis, estis 78,8%.

2.17 Gesamtzufriedenheit mit dem Modul (Studierende)




(2.17 ĝenerala kontenteco de la studentoj pri la tuta modulo; 1 malkontenta ... 4 kontenta)

4. Ergänzende Fragen


4.1 Geschlossene Fragen

1. Würden Sie das Modul (=SQ 25) weiterempfehlen?



(4. Aldonaj demandoj: Ĉu vi rekomendus la modulon al aliaj? Jes/Ne/Ne povas prijuĝi)

7. Ich könnte mir vorstellen, an einem Folgekurs teilzunehmen, um meine Sprachkenntnisse zu erweitern bzw. zu vertiefen.



(7. Mi povus imagi partopreni daŭrigan Esperanto-kurson por pligrandigi mian konojn. Jes/Ne/Ne povas prijuĝi)

Montriĝas, ke la plejmulto da studentoj estis kontenta pri la modulo. 80,0% rekomendus ĝin al aliaj studentoj, 92,0% esprimis la opinion, ke ĝi restu daŭre en la programo de la Leipziga Universitato kaj donis kaŭzojn por tio (vd. **suplementon B**, 1.5.2, p. 16-18). 42% de la studentoj povus imagi daŭrigi la Esperanto-kurson por pliampleksigi siajn lingvokonojn. Ĉefaj kritikaj punktoj estis la tro frumatena komenco de prelegoj kaj lingvokurso kaj la instrumaterialo uzita en la lingvokurso.

1.4 Konkludoj

Surbaze de la ekzamenaj rezultoj, de la studenta prijuĝo kaj mia propra pritakso la modulo estis sukceso. Dum unu semestro eblas doni profundan enkondukon al la fako Interlingvistiko/ Esperantologio kaj lernigi bazajn konojn de Esperanto. La akiritaj scioj kapabligas la partoprenantojn kompetente prijuĝi la temon planlingvoj kaj ties aplikado. Se ili deziras tion, la studentoj povus daŭrigi la lingvolernadon kaj pli intense okupiĝi pri elektitaj interlingvistikaj temoj.

Menciindas ankaŭ, ke la modulo estis bone akceptita de la Leipziga Universitato. La propono aldoni ĝin al la ekzistantaj ofertoj de “ŝlosilkvalifikoj” por la semestro 2007/2008 sufiĉe rapide trapasis la diversajn necesajn komisionojn kaj senprobleme estis akceptita. La modulo estis traktata kiel ĉiu alia en la programo ekde la anoncado reta kaj perbroŝura ĝis la fina elektronika pritaksado. Tamen oni ne

subtaksu la laboron kiun kaŭzas la organizo de tuta modulo por la respondeca instruisto. Kvankam mi konas la universitatajn strukturojn sufiĉe bone simple pro multjaraj spertoj, grandan parton de miaj fortoj mi devis uzi nur por solvi organizajn problemojn kiel informado de studentoj, registrado, disponigado de literaturo, ekzamenoj kaj prijuĝo. Necesas bone kunlabori kun la alia(j) instruisto(j). Sen tiuj antaŭkondiĉoj ja la plej interesaj prelegoj kaj seminarioj ne utilas.

La rezultoj donas kuraĝon daŭrigi la laboron. La plano estis, ke la subvencio de *ESF* havas ‘pordomalferman’ karakteron kaj helpas ekŝovi la permanentan establaron de la fakoj al la universitata pejzaĝo. Pro la ŝpardevigoj en germanaj universitatoj tio estas tre malfacila tasko. Mi nun ankoraŭ ne povas diri, ĉu la ĉi-rilataj klopodoj en la Leipziga Universitato estos sukcesaj.

Se oni vere atingos la celon kaj havos la ŝancon daŭrigi la modolon en la Leipziga Universitato oni pripensu denove la elekton de la instrumaterialo en la lingvokurso. Lernolibro plenumu du kondiĉojn. Unue, ĝi estu taŭga por la celgrupo, la temoj do devas interesi studentojn. Due, ĝi estu verkita laŭ la niveloŝtupoj, kiuj nun unuece validas laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (de A1 ĝis C2). La avantaĝo de tio ankaŭ estus, ke oni havus bazon de komparo por mezuri akiritajn Esperanto-konojn kun tiuj post kursoj en etnaj lingvoj. Necesas do analizi kaj kompari ekzistantajn instrumaterialojn por eltrovi ĉu ekzistas lernolibro kiu taŭgas por Esperanto-instruado en universitato kaj, se ne, pripensi ĉu oni povus verki ĝin. Alia projekto povus esti iniciati la publikigon de la prelegoj pri interlingvistiko/esperantologio por ke estontaj studentoj havu materialon por memstara legado, ripetado aŭ preparado de ekzamenoj.

Pro la kongruaj universitataj programoj kaj strukturoj kadre de la Bologna procezo la projekto estas transigebla al aliaj universitatoj en Germanio kaj aliaj Eŭropaj landoj. Sed necesas ne nur la financaj rimedoj por tio, sed ankaŭ bone kvalifikitaj personoj, faka literaturo en etnaj lingvoj en la bibliotekoj kaj instrumaterialoj kompareblaj al jenaj en aliaj fakoj. Tiu aspekto kondukas min al la sekva kaj fina rimarko.

La priskribita projekto surpaŝis novajn vojojn. Sub la titolo “Universalaj lingvoj” la fakoj Interlingvistiko/Esperantologio estis instruata en universitato kiel egalrajta kaj ordinara fakoj samranga al tradiciaj fakoj. La partoprenantoj devis same labori por ĝi kaj trapasi ekzamenojn por gajni siajn poentojn kiel por aliaj fakoj. Ili elektis la modolon pro tre praktikaj kaŭzoj, kiel la studenta pritaksado klarvide montras. La motivoj partopreni la modolon estis:

- intereso pri la temoj (14 el 24)
- devo elekti modolon por akiri la poentojn/ne povis ricevi alian modolon (6 el 24)
- deziro lerni Esperanton (4 el 24)
- mankanta intereso pri aliaj moduloj (2 el 24)
- utila aldono al ĉefa studofakoj (2 el 24)
- allogis ekskurso pri inventitaj lingvoj (1 el 24)

Do, niaj studentoj ne estas iuj fervoruloj kiuj akceptas preskaŭ ĉion por ĝui la agrablan Esperanto-etoson. Oni devas daŭre motivigi ilin kaj kelkfoje devigi ilin aktive partopreni seminarion kaj prepari sin por ekzameno. Ili estas kritikemaj junaj homoj, kiuj jam spertis multajn prelegojn kaj seminariojn kaj kiuj jam lernis fremdajn lingvojn laŭ modernaj metodoj helpe de altkvalitaj instrumaterialoj. Se Interlingvistiko/Esperantologio volas esti fakoj egalvalore instruata en universitatoj, ĝi devas preti esti komparata kun aliaj fakoj. Ni estu bone preparitaj al tio.

1.5 Suplementoj

1.5.1 Suplemento A: Pri la ekzamenoj

Skriba ekzameno: Tasko I

Schriftliche Prüfung im SQ-Modul 25 „Universalsprachen“

Teil I: Prüfung zum Sprachkurs Esperanto

Aufgabe: Schreiben Sie einen Brief von ca. 120 Wörtern an einen ausländischen Korrespondenzpartner in Esperanto. Wählen Sie eines der nachfolgenden Themen. Es ist auch möglich, die Themen miteinander zu kombinieren.

- (a) Vorstellung der eigenen Person
- (b) Familie
- (c) Heimatstadt/Studienstadt
- (d) eine Reise

Jen tri originalaj ekzemploj (t.e. nekorektitaj leteroj), (I) kaj (II) de tre bonaj leteroj (notoj: 1,3), (III) de malbona (noto: 4,0).

(I)

Prago, la 29-an Septembro en 2007

Mia kara amiko,

Kiel vi fartas? Mi fartas bone, ĉar mi skribas al vi el la bela urbo Prago. Nun estas aŭtuno kaj mi havas bonegan tempon en grandioza urbo kun miaj geamikoj. Hodiaŭ ni manĝis multe kaj trinkis plu multe da pilzena biero. Mi precipe ŝatas la manĝaĵojn en Prago. Tiu kuirmaniero estas perfekta! Morgaŭ, ĵaŭde, ni volas viziti konkreson pri Esperanto, kvankam mi malŝatas aŭdadi preleĝojn dum mia etvojaĝo. Eble mi anatataŭ iros tra parko rigardi la flavan foliaron aŭ promenandi trans "Karlovo"-ponton. Nun mi volus dormasi, sed mia ĉarma amicino deziras iri en diskejon. Nu ja, mi vole devas iri kun ŝi ...

Estas reala domaĝe, ke vi ne povas esti ĉi tie!

Do, fartu bone! Salutu vian familion kaj vian urbon Romon!

Korajn salutojn, xxx

(II)

La 30-an en januaro 2008

Kara Marko,

Kiel vi fartas? Mi fartas nun tre bone ĉar mi estas feliĉa ke mi povas diri al vi poŝtkarte kion mi penzas.

Vi ne konas min sed vi jam vivis min. Mi esperas ke vi memoriĝos kiam mi prezentas min.

Mia nomo estas Maria, mi havas 18 jarojn kaj mi estas lernatino en Berlino kie mi ankaŭ laboras ol kelnerino. En kafejo kion vi certe konas. Mi parolas de la kafejo „Floro“. En via libertempo vi trinkas tie kafon kun viaj geamikoj kaj vi manĝas kukon. Ĉu vi scias kiu mi estas? Mi estas la junulino kun la grandaj okuloj. Ĉiam kiam mi vidas vin, mi volas paroli kun vi sed mi ne estas kapabla. Mi kredas, ke mi amas vin. Via vizaĝo estas bela, viaj okuloj estas belaj, via voco estas bela, via maniero estas bela, via odoro estas bela. Ĉia estas bela! Pasintsemajne vi tuŝis mian manon kiam vi volis pagi vian kafon. Eble vi amas min ankaŭ kaj eble ni povas iri en la teatro.

Bonvolu respondu baldaŭ.

Saluton, Maria.

(III)

Kara Pierre,

Saluton Pierre. Mi scias! Mi ne scribi al via pli longe. Sed mi havis multen laborojn kaj mi faris unon vojaĝon en la Alpo. Ĝi estis plej bone. La vetero estis bone kaj estis tro varma por la jarsezonoj. Mi faris unu vojaĝo en Salzburgo kaj la lago de reĝo. Mi vidis multe montoj, la Kastelo de Salzburg kaj kelkspeca kurioza. Mi manĝis la specialaĵoj de la regionoj, mi grimpis al la plej altan montojn unu post la alia.

Sed ne ĉio estis bone. Mi havis unu akcidento en la lastan tagon. Mi stiris mia aŭtomobilo tra la urbo en tio momento unu autre aŭtomobilisto stiris en mia. Sed ne timas, mi ne estas lezi.

Sed, sudice de mia. Kiel vi fartas? Ĉu vi faris uno vojaĝo ankaŭ aŭ vi restis al la hejmo. Kiel via famiglio fartas? Ĉu via gefratoj kondukas malbona?

Scribu al mia. Ho la tempo. Mi havas multe laborojn. Mi deziras al vi ke vi fartu bone.

Saluton xxx

Skriba ekzameno, parto II

Teil II: Prüfung zu den Lehrinhalten von Seminar und Vorlesung

Aufgabe: Lesen Sie den folgenden Text (erschieden in der *Neuen Zürcher Zeitung* 10/1994) und setzen Sie sich kritisch damit auseinander. Ihre Argumentation sollte eine Definition von ‚Plansprache‘ sowie Aussagen zur Klassifikation von Plansprachen und -projekten beinhalten.

(Traduko: Tasko: Legu la sekvan tekston (publikigitan en ...) kaj traktu ĝin kritike. Via argumentado enhavu difinon de ‚planlingvo‘ kaj faktojn pri la klasifikado de planlingvoj kaj planlingvoprojektoj.)

Nachruf aufs Esperanto

Von Wolf Schneider (1994)

ES IST STILL GEWORDEN um die Welthilfssprachen, die ein paar versponnene Köpfe am Schreibtisch ersonnen haben. Unter dem Dutzend, von denen man weiss, war das Esperanto die bekannteste, von dem polnischen Augenarzt Ludwig Zamenhof 1887 konstruiert. Stalin wie Hitler nahmen es wichtig genug, um es zu verbieten, so widerlich fanden sie seinen am lautesten herausgestellten Vorzug, die wahre Internationalität; und in den fünfziger Jahren gab es keinen grösseren Kongress, bei dem nicht mindestens ein Teilnehmer forderte, die Diskussion in Esperanto fortzusetzen.

Woher kommt es, dass man die Kunstsprachen wohl allesamt für tot erklären darf — obwohl sie doch so durchschlagende Vorzüge haben: den logischen Aufbau, die simplen Regeln ohne Ausnahmen und eben die Unabhängigkeit von einer imperialen Macht? Vermutlich daher, dass sie allesamt an drei Schwächen kranken, Esperanto noch an einer mehr.

Keiner Nationalsprache die Weltgeltung gönnen — das hört sich hübsch an und ist zugleich der drastischste Nachteil der Kunstsprachen. Denn immer nur durch Vorherrschaft sind Weltsprachen entstanden, Griechisch und Lateinisch, Arabisch, Spanisch und Französisch — durch militärische, wirtschaftliche und kulturelle Übermacht. Das Englische aber trifft ins Zeitalter der erdumspannenden Kommunikation, Amerika kann seine Filme, Serien und Schallplatten bis zu den Fidschi-Inseln jagen.

Von Österreich bis Island werden Schlager englisch gesungen und wissenschaftliche Aufsätze englisch publiziert. Noch nie war der Bedarf an einer Kunstsprache so gering.

Zum Siegeszug des Englischen hat ein Unterschied zu allen früheren Weltsprachen beigetragen: seine für den Ausländer überaus erfreuliche Armut an Flexion. In keiner anderen Kultursprache wird so wenig konjugiert und dekliniert, in keiner anderen also wird man so selten durch das Ärgernis behelligt, beim Sprechen grübeln zu müssen, ob hier ein *n*, dort ein *s* anzuhängen ist, und nur geschrieben oder auch gesprochen?

Auf diesem Feld hat das Esperanto jene Torheit begangen, die es gegenüber den anderen Kunstsprachen zusätzlich in Nachteil bringt: Es verlangt eine komplizierte Deklination unter Einschluss des Adjektivs. *Ili amas liajn bonajn amikojn* heisst nichts anderes als 'They love their good friends'. Gemeinsam ist dem Esperanto mit allen anderen Kunstsprachen, die je zusammengebastelt werden könnten, dass ihnen ausser der Macht auch die Wärme fehlt, und selbst ihre strikte Logik geht uns im Grunde auf die Nerven.

Kunstsprachen bieten keine Kinderlieder und keine Verse an, keine Flüche, keine Witze, keine Redensarten. Ihre Wörter sind eindeutig und folglich einschichtig, sie haben keine Aura und keine Tiefe. Was schwingt nicht alles in einem prallen Wort wie *Mutter* mit: liebende Mütter und Rabenmütter, Stiefmütter und Schwiegermütter, Mutter Courage und Mutter Teresa, die Muttersprache und der Mutterboden, Hitlers Mutterkreuz und seit der Drohung Saddam Husseins «die Mutter aller Schlachten! Selbst in diesem uralten Schlüsselwort ist also Bewegung, es lebt, changiert und ruft immer neue Emotionen wach.

Solche Lebendigkeit rührt nun gerade davon her, dass das Wort «Mutter mit der Logik nicht oder nur zum Teil zu fassen ist. Selbst dort aber, wo man die Eindeutigkeit und Regelmäßigkeit bejahen müsste, in der Wissenschaft, ergäben sich Probleme. Da stellte 1906 der amerikanische Pfarrer Edward Foster die Kunstsprache *Ro* vor, die das Entzücken aller Philosophen hätte sein müssen; Descartes und Leibniz träumten von dergleichen. Foster teilte den Wortschatz in siebzehn Gruppen ein, die mit siebzehn verschiedenen Konsonanten beginnen: alle Gegenstände mit *b*, alle Tiere mit *m*. Die Säugetiere setzen sich mit *ma* fort, die Huftiere mit *mam*, die Einhufer mit *mamb*, und nachdem der Leser Buchstabe um Buchstabe zur niedrigeren Ordnung geführt worden ist, stösst er auf *mamba* das Pferd, *mambi* das Zebra, *mambe* der Esel.

Doch eben dieses eindrucksvolle Sprachgebäude würde sich in der Praxis als Kartenhaus erweisen. Angenommen, Zoologen diskutierten über Pferde, Esel, Maultiere und Zebras. Dass die vier nahe Verwandte sind, weiss ohnehin jeder Beteiligte; vor akustischem Missverständnis aber ist er durch den völlig unterschiedlichen Wortklang geschützt. Müsste man in dieser Runde dagegen von *mambas*, *mambis*, *mambos* und *mambes* sprechen, so würde es zu unzähligen Rückfragen und Verwechslungen kommen. Es ist also praktisch, die biologische Nähe *nicht* in eine Ähnlichkeit des Wortbilds zu übertragen — wie umgekehrt noch kein Ornithologe, der vom *Strauss* sprach, in seinen Zuhörern die Vorstellung Blumen, Johann, Richard oder Franz Josef hervorgerufen hat. Unlogisch, schillernd und ewig bewegt, so sind die lebenden Sprachen, und eben dies macht sie liebenswert und für die meisten Lebenslagen tauglich.

Mit dem doppelten Boden der natürlichen Wörter ausdrücklich zu spielen gehört zu unserem grössten Sprachvergnügen, nach dem Muster: »Man tagt und tagt, aber es dämmert keinem« oder »Die Anziehungskraft der Erde lässt allmählich nach« oder »Man wähle von zwei Politikern das kleinere«, und ein Esperanto, das uns nötigte, das Wort »Übel« hinzuzufügen, verdürbe uns das Spiel. Ruhet sanft, ihr Innerlinguas und Volapüks; die Sprache, sie ist nicht so.

La tasko:

La studentoj legis la germanlingvan tekston kaj traktis ĝin en la gepatra lingvo. Por la negermanaj legantoj, kiuj interesiĝas pri la tasko kaj la studentaj reagoj, mi esperantigis ĝin:

Nekrologo por Esperanto

de Wolf Schneider (1994)

Komenciĝis regi silento pri la mondhelplingvoj, kiujn kelkaj frenezetaĵoj elpensis ĉe skribotablo. Inter la dekduo, pri kiu oni scias, la plej konata estis Esperanto konstruita de la pola okulkuracisto L.Z. en 1887. Stalin same kiel Hitler trovis ĝin sufiĉe grava por malpermesi ĝin, tiom naŭza ili trovis ĝian plej laŭte elmontritan avantaĝon, la veran internaciecon; kaj en la 50-aj jaroj ne okazis grandeta kongreso, dum kiu ne almenaŭ unu partoprenanto postulis daŭrigi la diskuton en Esperanto.

Kiel oni povas klarigi, ke oni rajtas deklari verŝajne ĉiujn artefaritajn lingvojn mortintaj – kvankam ili posedas decidajn avantaĝojn: logikan strukturon, simplajn regulojn sen esceptoj kaj jes la sendependecon de imperia potenco? Supozeble tiel ke ili ĉiuj suferas je tri malsanoj, kaj Esperanto ankoraŭ je unu aldona.

Permesi al neniuj nacia lingvoj internacian valoron – tio sonas bele kaj estas samtempe la plej drasta malavantaĝo de la artefaritaj lingvoj. Ĉar estis ĉiam nur per hegeminio ke mondlingvoj estiĝis, la greka kaj la latina, la araba, hispana kaj franca – per milita, ekonomia kaj kultura superregadoj. Sed la angla trafas la eraon, kiam komunikado ĉirkaŭprenas la tutan terglobon, Usono povas sendi siajn filmojn, seriojn kaj sondiskojn ĝis la Fidĝioj. De Aŭstrio ĝis Islando oni kantas en la angla kaj publikigas sciencajn artikolojn en la angla. Neniuj antaŭe la neceso havi artefaritan lingvon estis tiom malgranda.

Al la triumfo de la angla kontribuis diferenco de ĉiuj aliaj mondlingvoj: sia malriĉeco je fleksio ege agrabla al eksterlandanoj. En neniuj aliaj kulturlingvoj oni tiom malmulte konjugacias kaj deklinacias, en neniuj aliaj lingvoj oni estas tiom malofte ĝenata per la domaĝo ke oni devas pripensi ĉu ĉi-tie oni aldonu iun *-n* kaj tie iun *-s* kaj ĉu oni faru tion nur en la skribita lingvo aŭ ankaŭ en la parolata.

En tiu kampo Esperanto montras la stultecon, kiu alportas aldonan malavantaĝon kompare al la aliaj artefaritaj lingvoj: Ĝi postulas komplikan deklinacion inkluzive de la adjektivo. *Ili amas liajn bonajn amikojn* signifas nenion alian ol *They love their good friends*. Trajto kiu estas komuna al Esperanto kaj ĉiuj aliaj artefaritaj lingvoj, kiujn oni iam povus amatorkunmetitaj, estas ke mankas al ili krom la potenco la varmeco, kaj eĉ ilia strikta logiko finfine agacas niajn nervojn.

Artefaritaj lingvoj ne havas infankantojn kaj versojn, neniujn sakraĵojn, neniujn ŝercojn, neniujn paroldiraĵojn. Iliaj vortoj estas unusencaj kaj sekve unutavolaj, ili havas neniun aŭron kaj neniun profundecon. Kiom multe kunleviĝas kun plenplena vorto kiel *Mutter* (,patrino'): *liebende Mütter* (,amantaj patrinoj') kaj *Rabenmütter* (laŭvorte: korpopatrinaj, t.e. kruelaj patrinoj), *Stiefmütter* (,duonpatrinoj') kaj *Schwiegermütter* (,bopatrinoj'), *Mutter Courage* kaj *Mutter Teresa*, *Muttersprache* (laŭvorte patrina lingvo, t.e. gepatra lingvo) kaj *Mutterboden* (laŭvorte patrina grundo, t.e. humo), la *Mutterkreuz* sub Hitler (laŭvorte patrina kruco, t.e. en nazia Germanio krucforma ordeno por patrinoj, kiuj naskis multajn infanojn kaj povis pruvi sian arjan rason) kaj ekde la minaco de Saddam Hussein "la patrino de ĉiuj bataloj". Eĉ en tiu praaĝa ŝlosilvorto estas ja movado, ĝi vivas, ĝi ŝanĝbrilas kaj elvokas ĉiam novajn emociojn.

Tia vigleco nun originas de tio, ke la vorto *Mutter* kaptblas ne aŭ nur parte per logiko. Sed eĉ tie kie unusenceco kaj reguleco devus esti jesata, en scienco, estiĝis problemoj. Tiel en 1906 la usona pastro Edward Foster prezentis la artefaritan lingvon *Ro*, kiu devintus esti la ravo de ĉiuj filozofoj; Descartes kaj Leibniz revis pri io simila. Foster subdividas la leksikon al deksep grupoj, kiuj komenciĝas per deksep diversaj konsonantoj: ĉiuj objektoj per *b*, ĉiuj bestoj per *m*. La mamuloj plue komenciĝas per *ma*, la hufuloj per *mam*, la unuhufuloj per *mamb*, kaj post kiam la leganto estis kondukita literon post litero al pli malalta ordo, li/ŝi trovas *mamba*, la ĉevalon, *mambi*, la zebbron, *mambe*, la azenon.

Sed ĝuste tiu impona lingvokonstruaĵo en praktiko evidentiĝis kartodomo. Ni imagu, zoologoj diskutas pri ĉevaloj, azenoj, muloj kaj zebroj. Ke la kvar estas proksimaj parencoj ĉiu el la partoprenantoj dekomence scias; sed kontraŭ akustika miskompreno protektas lin/ŝin la tute diferenca vortosono. Se en tiu rondo tamen oni devus paroli pri *mamba*-oj, *mambi*-oj, *mambo*-oj kaj *mambe*-oj, tiam estiĝus multnombraj redemandoj kaj intermiksoj. Estas do praktike ne transdoni biologian similecon al vorta simileco – kiel inverse neniu ornitologo, kiu parolis pri *Strauß* (‘struto’), elvokis ĉe la aŭskultantoj la imagon de floroj, Johann, Richard aŭ Franz Josef.¹ Nelogikaj, irizaj kaj eterne moviĝantaj – tiaj estas la vivantaj lingvoj kaj tio faras ilin amindaj kaj taŭgaj por plej multaj vivsituaĵoj.

Eksplacite ludi per la duobla fundo (ambigueco – S.F.) de naturaj vortoj apartenas al la plej grandaj lingvoplezuroj, laŭ la modelo *Man tagt und tagt, aber es dämmert keinem* (Oni kunsidas kaj kunsidas, sed neniu ekkomprenas)² aŭ *Die Anziehungskraft der Erde lässt allmählich nach* (La altira forto [komprenenda kaj en la faka senco ‘gravito’ kaj en la figura ‘ĉarmo’] iom post iom malpliĝas) aŭ *Man wähle von zwei Politikern das kleinere* (Oni elektu el du politikistoj la pli malgrandan [malbonaĵon])³, kaj Esperanto, kiu nin devigus aldoni la vorton ‘malbonaĵo’, venenus al ni la ludon. Ripozu en paco, vi Interlingua-oj kaj Volapuk-oj; la lingvo, ĝi ne estas tia.

La sekvaj kritikaj punktoj estis menciitaj en la studentaj argumentadoj:

- (1) malĝusta terminologio (Kunstsprache/artefarita lingvo estu aplikata al ekzemple komputilaj lingvoj kaj simbolaj sistemo; termino estis konscie uzita pro sia negativa konotacio)
- (2) Ro kaj Esperanto apartenas al du diversaj tipoj de planlingvoj: aprioraj/aposterioraj (diskuto pri la diferencoj inter la du tipoj; ĉefa kritiko – dum du alineoj – rilatas al Ro, kvankam teksto kritikis Esperanton; egaligi la du lingvojn estas manipulado; en Esperanto la nomoj de hufuloj ne similas: zebro, ĉevalo ktp.; oni konsideru la klasifikon de planlingvoj laŭ aplikado: Ro apenaŭ uzita, Esperanto ĝis hodiaŭ funkcianta)
- (3) Nombro de planlingvoj (ne nur estas «kelkaj frenezetaĵoj» kaj «dekduo»; granda nombro de planlingvoj montras ke ekzistas problemoj de lingva komunikado)
- (4) La angla ne estas facila (fleksio nur unu aspekto de lingvoj, la rilato inter grafemo kaj fonemo estas alia; la fakto ke oni aŭskultas anglan popmuzikon en la tuta mondo ne signifas, ke oni komprenas ĝin; la donita frazo en la angla ja montras kiom malfacila la lingvo estas: *their/there/they're*)
- (5) Publikaĵoj nur en la angla kaŭzas problemojn (manko de egalaj rajtoj de sciencistoj; unuflanka evoluo de sciencaj metodoj; malriĉiĝo de alietnaj faklingvoj)
- (6) La gramatiko de Esperanto ne estas malfacila
- (7) Infanaj kantoj, ŝercoj, frazeologio jes ekzistas
- (8) Ludado per la lingvo eblas en Esperanto (ekz. ŝajnhomonimio)

¹ La germana vorto *Strauß* povas krome signifi ‘bukedo’ kaj estas ofta familia nomo.

² La germana verbo *tagen* signifas kaj *kunsidi* kaj *tagiĝi*. La vorto *dämmern* same havas du signifojn: *krepuskiĝi* kaj (komunlingve) *ekkompreni*.

³ Tiu frazo ĉe parolanto de la germana tuj elvokas la paroldiraĵon *von zwei Übeln das kleinere wählen* (‘elekti el du malbonaĵoj la pli malgrandan’) kaj oni tiel kunkomprenas, ke ĉiu politikisto estas malbonaĵo.

- (9) La profundeco de *Mutter* ne estas bona argumento (vortoj en gepatra lingvo ĉiam havas konotaciojn, sed *mother* nur estas vorto por mi, kiun mi devas lerni)

Rimarko: La lingvan eraron (*Ili amas liajn bonajn amikojn – They love THEIR good friends*) bedaŭrinde neniu rimarkis.

1.5.2 Suplemento B: Pri la studentaj prijuĝoj

(Malfermaj demandoj. 4.2.

1. Kial vi elektis la modulon?

2. Ĉu laŭ via opinio la modulo restu en la programo de la Leipziga Universitato? Donu kaŭzojn.

- ĝi pligrandigas la universitatan edukooferton kaj interesas ĉiujn kiuj okupiĝas pri lingvistiko kaj lingvoj
- jes, ankaŭ estonte multaj studentoj havu la eblecon konatiĝi kun la unikeco de la temaro
- Kompreneble! Estas temo de granda intereso. Kiel ĉiu alia ankaŭ ...
- Ĉiukaze, ĉar mi opinias, ke (ĝis nun ankoraŭ ne sukcese) kreita planlingvo povus vere ŝanĝi pozitive, ĉar lingvo ankaŭ estas kunligita kun pensado kaj ĉar per tiu komuna komponanto ankaŭ la mondo estas rigardata kiel komuna mondo (la espero laste mortas ...). Por stimuli pensadon pri tiu temo kaj espereble ankaŭ aktivecon, la modulo “universalaj lingvoj” estu ĉiukaze ofertata plue.
- Jes, estis tre interesa kaj informriĉa, krome ĝi donas eblecon lerni Esperanton, kiun oni alie ne ricevas en tiu formo (lingvokurso ekstere de la reto)
- Jes, ĉar ĝi estas interesa kaj peras ja tre grandajn konojn pri lingvistikaj fenomenoj kaj lingvoj
- Jes, ĉar universalaj lingvoj estas grandparte nekonata temo
- Jes, mi pensas, ke pli multaj homoj lernu Esperanton kaj okupiĝu pri la problemo de internacia lingva komunikado
- Jes, ĉar la diskuto pri la lingva problemaro en la EU malfermas novan perspektivo
- Mi pensas, ke SQ 25 (= modulo “Universalaj lingvoj” – S.F.) estas io speciala, kiu distingas la Universitaton Leipzig. Tial ĝi estu plu ofertata.
- Jes, ĉar ne nur la planlingvo Esperanto estas traktata, enrigardo al aliaj planlingvoprojektoj estas ankaŭ permesata
- Jes, vidu pritakson pri plenumo de atendoj kaj tre bona lernigo de la enhavo
- Mi pensas, ke oni nepre daŭrigu oferti la modulon, sed se eblas je aliaj horoj
- Mi pensas, ke jes, ĉar kvankam multaj homoj konas la vorton Esperanto, ili ne scias kio sin kaŝas malantaŭ ĝi. Krome mi pensas, ke planlingvoj estas interesa, kvankam ne perfekta vojo solvi la lingvoproblemon, pro tio la modulo prezentas bonan fundamenton por formi opinion kiu baziĝas sur fona scio.
- Jes, ĉiukaze. Multaj el la prezentitaj enhavoj alie ne estas tiom facile riceveblaj
- Jes, ĉar estas el mia vidpunkto sencoplana kaj interesa temo.
- Almenaŭ ĉiun duan aŭ kvaran semestron la modulo estu je la dispono por homoj kiuj interesiĝas pri la temo, ĉar laŭ mia opinio alie oni ne havas la eblecon ricevi instruadon pri ĝi en tiu maniero (en maniero kiu inkluzivas kaj la teorion fundamenton kaj praktikan Esperantokurson)
- Tre varioplenaj enhavoj, temo unika.
- Jes, la modulo estas interese strukturata, la docentino mem interesiĝas kaj entuziasmiĝas pri ĝi kaj la modulo estas utila al ĉiuj studentoj kiuj elektis prilingvan studon.
- Jes, ĝi temas pri problemo kiu koncernas ĉiun inter ni: komunikado sen miskomprenoj en facila maniero, Eŭropa komunumo.
- Nepre.
- Jes, ĉar ĝi povas esti interesa por multaj homoj, antaŭ ĉio rilate la pluan studadon aŭ profesion laboron.

- Jes, ĝi ofertas temon interesan kiu „unuigas“ precipe prilingvajn studojn enigante aldonan teron de lingvoesplorado.)

ERGEBNISBERICHT DER MODULEVALUATION

UNIVERSITÄT LEIPZIG

4.2 Offene Fragen

Die Antworten der Studierenden auf die folgenden offenen Fragen werden in ungekürzter und unveränderter Form aufgelistet.

1. Warum haben Sie dieses Modul (=SQ 25) ausgewählt?

Interesse an der Erscheinung und Desinteresse an den anderen SQ- Angeboten (ich konnte kein wirklich interessanteres oder besser passendes SQ- Modul finden)

Leider als Ausweichmodul, um mit 30 LP pro Semester unterzukommen :(

Es ist zu den Themen meines Kernfaches eine nützliche Ergänzung, da die sprachwissenschaftliche Arbeit an Plansprachen eher marginal ist. Ich wollte schlicht Esperanto lernen.

wegen den fantasiesprachen (wurde schon in modulbeschreibung nur als "exkurs" angegeben; hatte trotzdem gehofft, es würde etwas intensiver behandelt)

Aus Interesse, es klang interessant.

Ich hab ekien anderes Modul bekommen, fand es aber vorher trotzdem recht interessant.

interesse an sprachen allgemein, selten lehrangebot zu universalsprachen

weil ich esperanto lernen wollte

Interesse

Weil ich eine mir unbekannte Sprache lernen wollte und die SQ 25 die einzige war, die ich bekommen habe.

aus Interesse

Weil ich Sprachen und ihre Entwicklung faszinierend finde. Und unter den vielen SQ war es eines der interessantesten, außerdem war es das einzige, das noch einen Platz für mich hatte.

großes interesse an linguistik und sprachpolitik. wollte mehr über plansprachen erfahren, fand die vorstellung esperanto zu lernen gut, weil man sonst nicht so eine chance in der uni bekommt.

Hab nichts anderes bekommen!

wegen des interessanten Inhalts

Ist das einzig sinnvolle SQ Modul, dass an der Universität angeboten wird.

Weil mich der Inhalt interessiert hat und von der Zeitplanung her alle drei Veranstaltungen gut in meinen kombinierten Uni-Arbeits-Plan gepasst haben. (Anm.: ich bin Teilzeitstudentin und arbeite abgesehen von meinem Uni-Montag Vollzeit)

kein anderes modul als schlüsselqualifikation mehr zu bekommen, interesse

Esperanto

Weil mich künstlich geschaffene Sprachen interessieren und ich mir durch dieses Modul einen größeren Einblick versprochen habe. Diesen habe ich auch erhalten.

interesse an sprachen, sprachsystem, grammatik

hat mich sofort durch seine beschreibung angesprochen, pures interesse also

- weil wir ein SQ-Modul wählen mussten...und der Mensch generell dazu neigt, das kleinere von 2 Übeln zu wählen...(ich meine..."Auf Jesus Spuren" oder "Universalsprachen"...keine schwere Entscheidung

Das Modul passt zu meinem Kernfach und weckte größeres Interesse an Sprachen allgemein.

2. Sind Sie der Meinung, dass das Modul (d.h. die SQ Universalsprachen) auch in künftigen Semestern an der Universität Leipzig angeboten werden sollte? Begründen Sie Ihre Antwort.

es erweitert das universitäre Bildungsangebot und ist für alle die sich mit Linguistik und Sprachen beschäftigen von Interesse

Ja, die Einmaligkeit die Thematik kennen zu lernen sollten viele Studierende auch zukünftig nutzen können

Natürlich! Es ist ein Thema von großem Interesse. Wie jedes andere auch...

auf jeden fall, da ich der meinung bin, dass eine (bis jetzt noch nicht erfolgreich) erschaffene plansprache wirklich die welt zum positiven verändern könnte, da sprache ja auch viel mit denken zu tun hat und durch diese gemeinsame komponente auch die welt als eine gemeinsame welt angesehen wird (die hoffnung stirbt zuletzt...). um über dieses thema zum nachdenken anzuregen und hoffentlich auch zum aktiv werden, sollte das sq-modul "universalsprachen" auf jeden fall weiterhin angeboten werden.

Ja, es war sehr interessant und informativ, außerdem gibt es die Möglichkeit, Esperanto zu lernen, die man sonst in dieser Form (Sprachkurs außerhalb des Internets) nicht allzu oft bekommt.

Ja, weil es interessant ist und eine doch sehr große Kenntnis über linguistische Phänomene und Sprachen vermittelt.

ja, da universalsprachen zum großteil unbekanntes thema ist

ja, ich finde mehr leute sollten esperanto lernen bzw. sollten sich mit dem problem der internationalen sprachlichen kommunikation auseinandersetzen

ja, da die Diskussion um das Sprachproblem in der EU einen neuen Blickwinkel eröffnet

Ich denke, dass die SQ 25 etwas besonderes ist, das die Uni Leipzig auszeichnet. Deswegen sollte sie weiterhin angeboten werden.

Ja, da nicht nur esperanto als Plansprache abgehandelt wird, sondern auch Einblicke in andere weniger bekannte Plansprachenprojekte gegeben wird.

Ja, siehe Bewertung zu Erfüllung der Erwartungen und sehr guten Vermittlung des Inhaltes

Ich finde, dass man das Modul unbedingt weiter anbieten sollte, aber wenn möglich zu anderen Uhrzeiten.

ja, ich denke schon, denn viele menschen kennen zwar den begriff esperanto, aber wissen nicht, was sich hinter dem problem verbirgt. außerdem denke ich, dass plansprachen ein interessanter, wenn vielleicht nicht perfekter, ansatz zur lösung des sprachenproblems sind, deshalb bietet das modul eine gute grundlage, um sich eine meinung zu bilden, die auf hintergrundwissen basiert.

Ja auf jeden Fall. Viel von den vermittelten Inhalten sind sonst nicht so einfach in dem Maße zu erhalten.

Ja, da es in meinen Augen ein sinnvolles und auch interessantes Thema ist.

Zumindest alle zwei bis vier Semester sollte für Interessierte an der Thematik dieses Modul zur Belegung zur Verfügung stehen, da man meiner Ansicht nach ansonsten eher weniger die Möglichkeit hat, die Thematik in diesem Umfang (sowohl auf die theoretischen Grundlagen von Plansprachen als auch auf die Sprachpraxis des Esperantokurses bezogen) vermittelt zu bekommen.

sehr abwechslungsreiche inhalte, thematik einmalig

Ja. Das Modul ist interessant aufgebaut, die Dozentin ist an dem Thema selbst interessiert und sehr begeistert davon und des Weiteren ist es sehr nützlich für Studenten die ein sprachliches Studium gewählt haben.

ja, behandelt ein problem, dass uns alle betrifft: kommunikation ohne missverständnisse auf einfachem wege, europäische gemeinschaft

unbedingt

ja, weil es für viele Leute doch sehr interessant sein kann, vor allem im Hinblick auf späteren Studienverlauf oder Berufsweg

Ja, es bietet ein Thema welches interessant ist, besonders die Studiengänge der Sprachen "vereint" indem es ein zusätzliches Gebiet der Sprachforschung einbringt.

1.5.3 Suplemento C: Enketo

Kadre de la seminario du studentinoj memstare verkis kaj analizis la suban demandilon pri problemoj de internacia lingva komunikado.

Umfrage
Thema: „Internationale sprachliche Kommunikation“

(Hinweis zum Ausfüllen des Fragebogens: Mehrfachnennungen möglich!)

1. Selbsteinschätzung zu Sprachkenntnissen:

Meine Muttersprache ist _____ und ich schätze meine Fremdsprachenkenntnisse wie folgt ein:

(Bemerkung: nicht erlernte Sprachen ignorieren!, Zutreffendes bitte ankreuzen, nicht aufgeführte erlernte Sprachen ergänzen)

Ich kann in den Sprachen:	Deutsch	Englisch	Französisch	Latein	Russisch	Spanisch	<u>andere:</u>
fließend sprechen	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>
Texte lesen und verstehen	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>
Texte verfassen	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>
Gespräche verstehen	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>
Ich habe Grundkenntnisse in:	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>	<input type="radio"/>

2. Einstellung zur Sprachenvielfalt und ihre Auswirkung auf die internationale Kommunikation

Ich denke, dass es: kein ein geringes, duldbares ein großes, abzuschaffendes Sprachenproblem gibt.

3. Einstellung zu Plansprachen

Definition *Plansprache* lt. Wüster (1931): „eine von [...] Menschen [...] nach bestimmten Kriterien bewusst geschaffene Sprache zum Zwecke der Erleichterung der internationalen sprachlichen Kommunikation“

Ich habe den Begriff „Plansprache“:

- noch nie gehört.
- schon gehört, aber mir keine Gedanken darüber gemacht.
- schon gehört und bin im Allgemeinen:
 - für gegen die Einführung einer Plansprache.
- schon gehört. Finde aber, dass Englisch als Weltsprache vollkommen genügt.

Von folgenden Plansprachen habe ich bereits gehört:

- Esperanto Volapük Interlingua Interlingue (Occidental) Loglan
- Lojban Ido Latino sine flexione Weltdeutsch
- andere, und zwar: _____

Davon habe ich folgende Plansprachen gelernt: _____

Mir gefällt diese Plansprache. Begründung: _____

Mir gefällt diese Plansprache nicht. Begründung: _____

Ich glaube, dass eine Erleichterung der internationalen Kommunikation eher erzielt wird durch:

eine künstlich geschaffene, einfach zu erlernende Sprache (Plansprache), weil _____

eine „natürliche“ Sprache (z.B. Deutsch, Englisch), weil _____

andere Möglichkeit: _____

Sollte in Zukunft eine Plansprache (z.B. Esperanto) bereits an Schulen gelehrt werden?

Ja, weil _____

Nein, weil _____

4. Zur Person:

Alter: _____

Geschlecht: m w

Beruf: SchülerIn StudentIn Arbeitsuchende/r
 ArbeitnehmerIn ArbeitgeberIn RentnerIn

Bildungsstand: Hauptschulabschluss Realschulabschluss
 Fachabitur Allg. Hochschulreife
 Hochschulabschluss

Bemerkungen zum Fragebogen:



Traduko de la subaj tabeloj: Enketo

Temo: „Internacia lingva Komunikado“
(Rimarko rilate al la demandilo: Pluraj respondoj eblas!)

1. Mempritaksado de lingvokonoj:

Mia gepatra lingvo estas _____ kaj mi pritaksas miajn lingvokonojn sekvamane:

(Rimarko: Ignoru lingvojn ne lernitajn! Bonvolu fari krucon en la ĝusta loko, aldonu ne menciitajn lingvojn.)

Mi kapablas en la lingvoj	germana	angla	franca	latina	rusa	hispana	aliaj
paroli flue							
legi kaj kompreni tekstojn							
verki tekstojn							
kompreni interparoladojn							
Mi havas bazajn konojn en la							

2. Sinteno al multlingveco kaj ties sekvoj por internacia komunikado

Mi pensas, ke ekzistas: neniu malgranda, tolerebla granda, forigenda lingvoproblemo.

3. Sinteno al planlingvoj

Difino *Planlingvo* laŭ Wüster (1931):

„lingvo, kiu estis konscie kreita fare de la homo [...] laŭ certaj kriterioj por plifaciligi la internacian lingvan komunikadon“

La vorton „planlingvo“ mi:

neniam antaŭe aŭdis.

jam aŭdis, sed ne pripensis ĝin.

jam aŭdis kaj estas ĝenerale:

por kontraŭ enkonduko de planlingvo.

jam aŭdis. Sed mi opinias, ke la angla kiel internacia lingvo plene sufiĉas.

Mi jam aŭdis pri la sekvaj planlingvoj:

Esperanto Volapük Interlingua Interlingue (Occidental) Loglan Lojban Ido

Latino sine flexione Weltdeutsch

aliaj, nome: _____

El tiuj mi lernis la sekvajn planlingvojn: _____

Al mi plaĉas tiu planlingvo. Kaŭzoj: _____

Al mi ne plaĉas tiu planlingvo. Kaŭzoj: _____

Mi opinias, ke plifaciligon de la internacia komunikado oni atingas pli bone per:

artefarite kreita, facile lernebla lingvo (planlingvo), ĉar _____

„natura“ lingvo (ekz. la germana, angla), ĉar _____

alia ebleco: _____

germana angla franca latina rusa hispana
Ĉu estonte oni lernu planlingvon (ekz. Esperanton) jam en la lernejo?

jes, ĉar _____

ne,
ĉar _____

4. Pri mia persono:

aĝo: _____ sekso: viro virino

profesio: lernant(in)o student(in)o serĉas laboron laborprenant(in)o labordonant(in)o
 pensiul(in)o

Eduka nivelo: baza lernejo (Hauptschulabschluss)
 mezlernejo 10-jara (Realschulabschluss)
 faka gimnazio (Fachabitur)
 ĝenerala gimnazio (Allg. Hochschulreife)
 finis universitaton

Rimarkoj pri la demandilo:

La enketon partoprenis 444 personoj. Ĉar ĝi rekte rilatas al la temoj de la modulo, ŝajnas utile mencii kelkajn el la trovitaj rezultoj (kvankam la demandilo kelkkriterie certe plibonigindas).

1. Mempritaksado pri lingvokonoj

Gepatra lingvo								
	araba	Germana	angla	itala	korea*	pola	rusa	ukraina
Entute	2	412	4	2	8	2	12	2

Preskaŭ ĉiuj el la demanditoj parolas la germanan kiel gepatran lingvon. La ĉefa fremdlingvo estas la angla. La plejmulto legas, komprenas aŭ verkas tekstojn en tiu lingvo kaj komprenas interparoladojn. 46,2% informas, ke ili havas bazajn konojn en la angla; nur 29,0% parolas la anglan flue.

	germana	angla	franca	latina	rusa	hispana
flue parolas	20	129	15	0	13	9
legas kaj komprenas tekstojn	23	259	72	41	44	23
verkas tekstojn	19	214	39	7	26	18

komprenas interparoladojn	28	262	59	0	49	27
havas bazajn konojn en la	13	205	137	92	146	54

2. Sinteno al multlingveco kaj ties sekvoj por internacia komunikado

22,1% opinias, ke ekzistas **neniu** lingvoproblemo.

47,7% opinias, ke ekzistas **malgranda**, tolerebla lingvoproblemo.

26,1% opinias, ke ekzistas **granda**, forigenda lingvoproblemo.

3. Sinteno al planlingvoj

49,3% neniam antaŭe aŭdis la vorton 'planlingvo'.

50,7% jam aŭdis ĝin.



Inter tiuj kiuj jam aŭdis ĝin, 12,8% estas **por** enkonduko de planlingvo.

18,7% estas **kontraŭ** enkonduko de planlingvo.

29,7% pensas, ke la angla sufiĉas.

39,7% ne pripensis la aferon.

Pri Esperanto jam aŭdis 66,0%. Pri Interlingua, Ido kaj Volapük proksimume po 7%.



La plejmulto da demanditoj (57,0%) pensas, ke plifaciligon de la internacia komunikado oni atingas pli bone per etna lingvo, ĉar ekz.:

- ties disvastiĝo okazas nature (per ekonomio ...)
- artefaritan lingvon oni ne akceptos (Usono), neniam sukcesos

- la angla jam estas vaste uzata kaj instruata en lernejo
- planlingvoj ne estas flekseblaj, dialektoj, uzeblaj en limigita formo
- granda nombro de parolantoj ekzistas, gepatraj parolantoj pli bonaj instruistoj
- pli bone la ĉina kiel mondolingvo ol lingvo sen evoluvojo kaj kulturo
- la pli aĝaj decidas → konservas la malnovan elprovitan, apenaŭ ŝanĝo
- artefarita lingvo “artefarita”, kvankam facile lernebla
- nombro da lingvoj sufiĉas, bezonoj nature alĝustigitaj
- pli alloga, ĉar ankaŭ uzebla dum ferioj kaj en la ĉiutaga vivo, pro kulturo lingvo “palpebra”
- pli facile lernebla, lingvoj estas parencaj
- pluevoluado de planlingvo ne eblas (novaj esprimoj)
- artefaritaj lingvoj kondukas al forigo de naturaj lingvoj
- pluevoluas pro kontakto kun aliaj lingvoj
- ne ankoraŭ unu alia lingvo devas esti lernata, ne necesas reformoj aŭ ŝanĝoj
- planlingvo tro altrudata.

Nur proks. 20% preferas planlingvon, ĉar ekz.

- estas bona solvo, se vere facila
- oni ne devas lerni multan gramatikon, facilaj strukturoj por ĉiuj
- egaleca por ĉiuj, neniuj diskriminacio
- jam havas strukturojn el konataj lingvoj
- oni povas inkluzivi influojn el ĉiuj lingvoj.

Aliaj eblaj metodoj estas:

- hazarda miksiĝo de naturaj lingvoj al nova tutaj
- uzado de ĉiuj lingvoj, kiujn oni konas, kun la partnero
- sufiĉas tradukistoj, komunikado ne estas problemo
- kombinaĵo inter planlingvo kaj natura lingvo
- komputiloj kiuj anstataŭigas tradukistojn (ĉiuj lingvoj en unu aparato)

La plejmulto de la demanditoj estas kontraŭ enkonduko al lernejoj, ĉar (ekz.):

- estas sensenca, oni ne bezonas tion en la vivo
- koncentriĝo al naturaj lingvoj pli senchava
- ne kiel deviga fako, ne utilas
- planlingvoj estis subjektive formitaj de kelkaj «blankkitoj»
- for de la emocioj en lingvoj al pura formoligita instrumento, tio ne estas altira
- prioritato estu regado de la gepatra lingvo
- detruo de diverseco, kulturperdo, gepatrajn lingvojn oni devus forigi
- oni ne decidu tion desupre (vd. ortografian reformon)
- la angla jam rekonita, oni komencas jam en infanĝardeno, oni ne ĝenu tion
- ne estas rekonita
- tro multe, oni devus forstrecki aliajn fakojn el la programo
- ne estas vojaĝcelo, kie lingvo aplikeblas
- nur kaŭzus problemojn
- ne eblas rapide krei lingvon per kiu oni kapablu interkompreniĝi
- novstrukturigo de lernejo necesus
- ne estas sufiĉe uzata en la mondo, multaj nenion scias pri tio

Argumentoj por enkonduko estis (ekz.):

- avantaĝo koni multajn lingvojn
- kondukus al pli bona reputacio de planlingvoj, nur tiam ili havas ŝancon
- ponto inter kulturoj
- komunikilo kun estonteco
- povus plifaciligi komunikadon (krom en scienco, tie tro esprimmalriĉa)
- tiel oni povus klarigi strukturon de lingvoj ĝenerale
- interesa el la vidpunkto de hegemonio de unu lingvo
- subtenas logikan pensadon
- estas parto de Eŭropa historio.

4. Pri mia persono

	15-19 jar.	20-25	26-29	30-39	40-49	50-55	56-78
Grupo "jam aŭdis"	21 (50%)	98 (59%)	34 (61%)	15 (48%)	25 (30%)	10 (40%)	15 (37%)
"neniam aŭdis"	21 (50%)	68 (41%)	22 (39%)	16 (52%)	58 (70%)	15 (60%)	25 (63%)
Entute	42	166	56	31	83	25	40

	virina	vira	nenia
Grupo "jam aŭdis"	123 (52%)	94 (46%)	2
"neniam aŭdis"	114 (48%)	111 (54%)	0
Entute	237	205	2

	Lernant(in)o	Student(in)o	Serĉas laboron	Labor-prenant(in)o	Labor-donant(in)o	Pensiuloj
Grupo "jam aŭdis"	18 (44%)	97 (68%)	5 (36%)	82 (40%)	7 (64%)	9 (29%)
„neniam aŭdis“	23 (56%)	45 (32%)	9 (64%)	122 (60%)	4 (36%)	22 (71%)
Entute	41	142	14	204	11	31

	8-jara praktika lernejo	ĝeneralkleriga 10-klasa lernejo	12/13-jara faka gimnazio	12/13-jara ĝenerala gimnazio	Finis universitaton
Grupo "jam aŭdis"	3 (20%)	36 (26%)	12 (44%)	111 (64%)	72 (69%)
„neniam aŭdis“	12 (80%)	102 (74%)	15 (56%)	63 (36%)	33 (31%)
Entute	15	138	27	174	105

La socistatistikaj datumoj montras ke junaj homoj (15-29 jaraĝaj) scias pli multe pri la temo ol maljunaj (30-78). La scio pri planlingvoj dependas de la eduka nivelo. Proksimume triono de la homoj kiuj finis universitaton neniam antaŭe aŭdis pri planlingvoj.

6 Menciita literaturo

Ammon, Ulrich (1994): «The Present Dominance of English in Europe». En: Ammon, Ulrich/Mattheier, Klaus J./Nelde, Peter H. (eds.): *Sociolinguistica* 8/1994, 1-14.

Grin, François (2005): L'enseignement des langues étrangères comme politique publique (Rapport établi à la demande de Haut Conseil de l'Évaluation de l'École, No. 19. Paris: Haut Conseil de l'Évaluation de l'École. Septembre 2005). <www.unige.ch/eti/elf>

2 Interlingvistikaj studoj en Poznano/Pollando

Ilona Koutny

2.1 Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj jam dek jarojn

La Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano, la dua plej granda universitato en Pollando, ofertas 3-jaran eksteran postdiploman studadon pri interlingvistiko, kiu funkcias jam de 10 jaroj. La internacia kursaro okazas en la Lingvistika Instituto, sub la gvido de *d-rino Ilona Koutny*, membro de la Akademio de Esperanto.

Inter la prelegantoj estas elstaraj esperantologoj, kiel profesoroj *Humphrey Tonkin*, *John Wells*, *Aleksander Melnikov* kaj *Michel Duc Goninaz*; doktoroj *Věra Barandovská-Frank*, *Detlev Blanke*, *Katalin Kováts*, *Zbigniew Galor* kaj *Blazio Vaha*; la poetino *Lidia Ligeza*, ekspertoj de sia tereno kiel *Maria Majerczak*, *Tomasz Chmielik*, *István Ertl*, *Aleksander Korĵenkov*, *Michael Farris* kaj *Bradio Moro*.

La Interlingvistikaj Studoj donas superrigardon pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, fokusiĝas al internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de esperanto.

En la tria jaro eblas specialiĝi pri komunikado, lingvistiko, literaturo, tradukado, planlingvistiko aŭ pri lingvopedagogio. Pro la metodika formado la Studoj ricevas specialan rolon en la instruista trejnadon. Ekde la studjaro 2007/08 realiĝas kunlaboro kun ILEI.

Unusemajnaj intensaj sesioj (surlokaj kursoj de po 4 studobjektoj kaj ekzamenoj) okazas unufoje dum la semestro (fine de septembro kaj komence de februaro), intertempe la gestudentoj laboras pri siaj taskoj hejme kaj konsultiĝas rete kun la prelegantoj. La gestudentoj pretigos diplomlaboraĵon kaj post la fina ekzameno ricevos atestilon pri postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj.

Partoprenontoj povas aliĝi el la tuta mondo por la studjaro 2008/2009 ĝis la 15-a de aŭgusto 2008. Pli frua anonco estas bonvena. La unua sesio okazos inter la 13-17.09.2008.

Postuloj: diplomo pri superagradaj studoj kaj bona scio de esperanto. Partoprenontoj devas plenumi orientigan teston komence de la unua sesio. Kelkaj stipendioj estas antaŭvidataj dank'al ESF (Esperanto Studies Foundation).

Kotizo por unu semestro: 1850 PLN (ĉ. 500 EUR), reduktita 700 PLN (ĉ. 200 EUR) por B-landoj.

Por pluaj informoj kaj aliĝilo kontaktu: interling@amu.edu.pl aŭ *d-rino Ilona Koutny*, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj,

Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz

al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan

T: +48 61-829-36-75, hejme: +48 61-872-83-09

E: ikoutny@amu.edu.pl, <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

Ĉi-foje okazos ankaŭ festa interlingvistika simpozio kun riĉa programo okaze de la 10-jariĝo de la Studoj post la unua sesio (18-19a de septembro 2008), al kiu ni invitas ĉiujn niajn gestudentojn kaj prelegantojn kaj interesiĝantojn. La septembra sesio estas kunligita kun la semajnfina kultura renkontiĝo ARKONES (19-21.08), same en Poznano, kiu post la intensa tutsemajna serioza laboro ebligas malstreĉiĝon (kun teatraĵoj, muziko, diskutoj, ktp). Se la studentoj bezonas lingvan perfektigon, eblas aranĝi superanivelan intensan lingvokurson (unusemajnan) antaŭ la septembra sesio kontraŭ kroma kotizo.

2.2 Riĉa kaj sukcesa interlingvistika sesio en UAM (01-09.02.2008)

La nuna interlingvistika grupo de 1-a ĝis 9-a de februaro 2008 ĉeestis sian 6an kaj lastan sesion en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (PL). La persistaj 18 gestudentoj (el 10 landoj) partoprenis entuziasme la prelegojn kaj praktikan laboron en tri specialiĝoj: komunikado, lingvistiko kaj metodiko. Okazis kurso pri interkultura komunikado far *prof. Humphrey Tonkin* (lingvo kaj socio), *Michael Farris* (signolingvo kaj parolata lingvo); pri radia komunikado far *Barbara Pietrzak* (longjara gvidantino de la esperantaj elsendoj de Radio Polonia, nun ĝenerala sekretario de UEA); pri sociologiaj aspektoj de komunikado far *d-ro Zbigniew Galor*, pri vortospecoj kaj denaskismo far *d-ro Balázs Wacha* (Blazio Vaha).

La instruista trejnado estas sur bona vojo

La metodikan specialiĝon reĝisoris energie *d-ino Katalin Kováts*, tiel la ekzamenoj iĝis metiejaj diskutoj de veraj instruistoj. Kurson pri metodiko gvidis *Maria Majerczak*, metodikistino el la Jagiellona Universitato (Krakovo) kaj kontribuis *Zsófia Kóródy* kaj *d-ino Ilona Koutny*. La partoprenantoj havis eblecon testi sin mem kaj samtempe la unuan C1-nivelan teston (el la novtipa lingvoekzameno, kiun ILEI ellaboras kun la budapeŝta lingvoinstituto ITK por akreditigo).

La Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI decidis kunlabori en la formado de esperanto-instruistoj, kiu delonge atendis solvon. La kontrakton inter la du institucioj nun subskribis la gvidanto de la Studoj, *d-ino Ilona Koutny* kaj la dekanano de la Novfilologia Fakultato de UAM, *prof. Józef Darski*, vicdekanano *prof. Jacek Witkoś*, aliflanke *Zsófia Kóródy*, vicprezidanto de ILEI.

Enkadre de la komuna programo kaj formado estis ebleco jam en septembro aliĝi al la metodika specialiĝo de la Studoj, kiu realiĝas en la studjaro 2007/08. La ses aliĝintoj (el 5 landoj) krom la komunaj metodikaj kursoj kaj ekzamenoj povis partopreni lingvan perfektigon, etkursojn pri literaturo kaj gramatiko.

Malferma prelego en la Lingvistika Instituto

La nunan sesion stampis la intensa kontribuo de *Humphrey Tonkin*. Li prelegis ankaŭ pri la nuntempaj problemoj de e-movado por la tuta grupo kaj eksteraj interesiĝantoj. El liaj prelegoj antaŭ 3 jaroj naskiĝis lia libro *Lingvo kaj popolo* (2006). La nova kurso estis denove instiga.

Por kolegoj kaj gestudentoj de la Lingvistika Instituto de UAM, kiuj grandnombre aperis malgraŭ la intersemestra ferio, li prelegis angle pri *Ekskludo kaj inkludo en Eŭropo: serĉado de eŭropa lingvopolitiko* kun granda sukceso. Ankaŭ lia interparolo kun vicrektoro *prof. Marek Kręglewski* (kiu malfermis la publikan lingvopolitikan konferencon de la Studoj en septembro 2006) estis fruktodona.

3 Pri lingvo-inventado en la universitato de Greifswald

Dum la vintra semestro 2007/08 en la Instituto pri slavaj lingvoj de la nordgermana Universitato Greifswald *d-rino habil. Cornelia Mannewitz* okazigis seminarion pri la temo “Lingvo-inventado en slavaj landoj”. Krom prezento de la kvazaŭ unua slava interlingvisto, la kroata kleriko *Juraj Križanić*, kaj lia filologia laboro sekvis ĝenerala enkonduko al interlingvistiko, lingvo-planado kaj superrigardo pri la historio de planlingvoj. La ĉefa temo de la seminario estis la moderntempa lingvo-inventado en slavaj landoj. Tio koncernis aŭtorojn de tiuj landoj aŭ tiujn, kiuj utiligis slavlingvan materialon. Detale estis traktita la projekto "Slovio" de *Mark Hucko* (<http://de.wikipedia.org/wiki/Slovio>). Por studentoj, ne konantaj slavajn lingvojn, la seminario donis la eblecon konatiĝi kun specifaĵoj de slavaj lingvoj.

Por la vintra semestro 20008/2009 *d-ino Mannewitz* planas seminarion pri la temo „Artefaritaj lingvoj – artefaritaj mondoj“. Dum tiu seminario ŝi volas prezenti inventitajn slavajn lingvojn, kiuj estas ligitaj al konkretaj sociaj utopioj. (Laŭ Cornelia Mannewitz)

4 Denis Silagi (1912 – 2007)

Detlev Blanke

4.1 La interlingvisto

95-jara en Munkeno (München/Germanio) forpasis jam la 20-an de novembro 2007 (ni malfrue eksciis pri tio) la publicisto, historiisto kaj interlingvisto *D-ro Denis Silagi*. De 1952 ĝis 1992 li unue laboris kiel redaktoro kaj poste kiel ĉefo de la munkena oficejo de la hungara servo de la usona stacio „Voĉo de Ameriko“. En diversaj libroj li ĉefe traktis historiajn temojn de Hungario, la rolon kaj tragedion de hungaraj judoj kaj aliajn temojn, i.a. psikanalizon.

En la interlingvistika literaturo la forpasinto konatiĝis sub la nomo *Dénes Szilágyi*, kiu naskiĝis 10.11.1912 en Budapeŝto. Post 1945 li germanigis sian nomon.

Dénes Szilágyi en 1927 unue eklernis Esperanton, poste okupiĝis pri Ido kaj Occidental kaj finfine ekaktivis en Latino sine Flexione (1903 kreita de *Giuseppe Peano*), simpligita varianto de la Latino, siatempe (sed ne poste) ankaŭ konata sub la nomo Interlingua⁴. Szilágyi antaŭ ĉio interesiĝis pri la psikologiaj motivoj, kiuj igas aŭtoron krei difinitan planlingvan projekton. Por studi tiun demandon, en 1928, nur 16-jara, li fondis en Budapeŝto interlingvistikan institucion, kiun li nomis „Officium interlinguisticum Budapeŝtensis“. Li havis kontaktojn kun reprezentantoj de multaj diversaj sistemoj.

Pri sia sinteno al planlingvoj li skribis al István Szerdahelyi: „Mi rilatis al la problemaro de artefaritaj lingvoj tiel, kiel ateisto pri la studo de diversaj religioj“.⁵

En decembro 1928 aperis la unua kajero de cirkulero de la interlingvistika oficejo kun la germana titolo “Bericht des Interlinguistischen Amtes zu Budapest” (Raporto de la interlingvistika oficejo de Budapeŝto). La adreso estis “Ungarische Vertretung der Academia pro Interlingua und der Occidental-Union” (Hungara reprezentejo de Academia pro Interlingua kaj Occidental-Unio).

La cirkuleroj poste nomiĝis „Communicationes Officii Interlinguistici Budapeŝtensis“ kaj ekde julio 1929 havis la latinan subtitolon „Libelli pro historia et scienca interlinguarum“. La periodaĵo aperis inter 1929 – 1930 kun entute 11 eldonoj, pli ol 100 p. La tekstoj estas redaktitaj en simpligita Latino. En sia bulteno Szilágyi informis pri novaj interlingvistikaj aktivaĵoj kaj recenzis verkojn. Li prezentis i.a. jenajn planlingvajn sistemojn: *Romanal*, *Latino sine flexione*, *Novial*, *Occidental*, *Novam*, *Meso*, *Cosman*, *Nov-Esperanto*, *Idiom Neutral*, *Nov Latin*, *Neolatino*, *Uniti Langue*, *Nepo* kaj *Ixracab*.

Dum septembro 1929 Szilágyi fondis komitaton por ellaborado de interlingvistika terminologio. Al la „Comitatu pro Elaboratione de Terminologia Interlinguistica“ apartenis i.a. *Walter Borgius (Berlino)*, *Ernest Drezen (Moskvo)*, *Edward P. Foster (Waverly/USA)*, *Otto Jespersen (Kopenhago)*, *Giacomo Meazzini (Florenco)*, *Giuseppe Peano (Torino)* kaj *Edgar de Wahl (Reval)*, do interlingvistoj kiuj reprezentis diversajn planlingvajn sistemojn. *Dénes Szilágyi* estis la sekretario de la komitato kaj ellaboris la diskutotajn tekstojn. En 1931 aperis lia terminologia studaĵo „Versus interlinguistica“

⁴ En kontribuo, publikigita en „Interlinguistische Informationen“ Silagi traktas la nomon „Interlingua“ por du diversaj planlingvaj sistemoj (Silagi 1996).

⁵ Pri tiuj kaj la sekvaj informoj kp. Szerdahelyi (1980).

(Szilágyi 1931a). Ĝin Hauptenthal (1976) reprenis en la originalo. Ankaŭ Věra Barandovská-Frank reprenis la tekston en „Grundlagenstudien für Kybernetik und Geisteswissenschaft“ (grkg) 1996 kun germana traduko kaj aldonis komentojn (Barandovská-Frank 1996).

Ekde 1930 Dénes Szilágyi kunlaboris kun Peano en „Academia pro Interlingua“ kaj ĝis 1938 sporade publikigis artikolojn en „Schola et Vita“, revuo unuavice redaktita en Latino sine Flexione.

Mi havis la feliĉon renkonti Denis Silagi kelkajn fojojn en Munkeno kaj konatiĝis kun ege multflanke klera kaj sprita homo. Kvankam delonge ne plu aktiva en la interlingvistika medio, li tamen konservis sian intereson pri la temaro kaj estis membro de la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.; GIL) dum multaj jaroj.

4.2 Ĉefaj verkoj

Sekvas elekto de interlingvistikaj verkoj de Dénes Szilágyi/Denis Silagi resp. tekstoj de li pri aliaj temoj, sed verkitaj en Latino sine Flexione. Kompleta bibliografio de liaj interlingvistikaj verkoj dezirindas, sed mi ankoraŭ ne posedas ĉiujn trarigardindajn planlingvajn revuojn.

Silagi, Denes (1949): Das „jüdische“ Esperanto, En: Neue Welt und Judenstaat, Wien, Mitte Januar (sic!), p. 3.

- (1996): Der Name „Interlingua“. En: Interlinguistische Informationen 5, Nr. 20 (2), p. 6-11.

Szilágyi, Dénes (1931a): Versus interlinguistica. Principios de interlinguistica generale. Dictionario terminologica de interlinguistica. En: Schola et Vita, VI, Nr. 4-5 (Aprile-Maio), S. 97-120. (Ankaŭ aperis kiel memstara presaĵo. Represo en Hauptenthal 1976, p. 163-187.)

- (1931b): Uno critico de Latino sine Flexione. En: Schola et Vita, VI, Nr. 11-12 (Novembre-December), p. 325-328.

- (1932a): Mackay poeta. En: Schola et Vita VII, Nr. 1-2 (Januario-Aprile), p. 51-55.

- (1932b): Peano et interlinguistica. En: Schola et Vita VII, Nr. 3 (Majo-Junio.), p. 149-153.

- (1932c): De Psychoanaysi sive Freudismo. Theses duodeviginti. En: Schola et Vita VII, Nr. 5 (Septembre-October), p. 267-272.

- (1933): De Latino sine Flexione. En: Schola et Vita VIII, Nr. 1-2 (Januario-Aprile), p. 69-75.

- (1938): Interlinguistica et paedagogia. En: Schola et Vita XIII, Nr. 2, p. 25-28.

Sekundara literaturo:

Barandovská-Frank, Věra (1996): “Versus Interlinguistica” / Aus der Geschichte der Interlinguistik. En: Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/ Humankybernetik (grkg) 37, Nr. 2, p. 71-82.

Hauptenthal, Reinhard (1976, Red.): Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik. Darmstadt: Wiss. Buchgesellschaft.

Szerdahelyi, István (1980): La hungara modelo en interlingvistiko. En: Szerdahelyi, István (Red.): Miscellanea interlinguistica. Budapest: Tankönyvkiadó, p. 14-98.

5 Claude Piron (1931-2008)

5.1 La homo

Claude Piron, naskita en la jaro 1931 en Namur (Belgio), estis unu el la plej kleraj multtalentuloj de la esperanta lingvo-komunumo. De 1956-1961 li laboris kiel protokoltradukisto (i.a. por la ĉina) ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj poste por la Monda Sanorganizo (World Health Organization, WHO) en Ĝenevo, krome diversloke en Azio kaj Afriko. Ekde 1969 li laboris kiel psikoterapeŭto kaj instruis la fakon en la edukscienca fakultato de la ĝeneva universitato de 1973-1994. La postlasita verkaro de Claude Piron estas multflanka. De aparta signifo estas liaj studoj pri la psikologiaj kialoj de la rezisto kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. Li produktis multajn eseojn, ankaŭ esperantologiajn, Kiel bonega oratoro li kapablis fascini siajn aŭskultantojn. En lia karaktero ankaŭ estis trajto de artisto. Li verkis kelkajn romanojn kaj foje eĉ kantis memverkitajn kanzonojn.

Laŭ mi la plej bona metodo omaĝi al *Claude Piron* estas atentigi pri liaj verkoj kaj el ili ĉerpi scion kaj kuraĝigon. Pro tio mi publikigas la sekvan abundan, tamen ne kompletan, bibliografion de liaj verkoj laŭ la listo trovita la 29-an de januaro 2008 sub <http://claudepiron.free.fr/bibliographie.htm>. La listo estas originale reproduktita kaj kiel tia ne respondas al la kutimaj kriterioj de scienca bibliografio. La titoloj, markitaj per * mankas en la originala listo. Mi aldonis ilin laŭ mia propra bibliografia sliparo. Verŝajne mankas ankaŭ aliaj titoloj de la multproduktiva verkisto, inter ili i.a. tradukoj en diversajn aliaj lingvojn. Piron ankaŭ aktive partoprenis la plej diversajn diskutojn en la reto, uzante kelkajn lingvojn, almenaŭ Esperanton, la francan kaj la anglan.

5.2 Publicaĵoj pri Esperanto kaj lingva komunikado

En la dana

- *"Psykologiske aspekter af verdens sprogproblem og of esperanto". En: Esperanto-nytt (Kopenhagen), 8 (2000), Nr. 2, p. 4-9.

En la germana

- "Esperanto: eine linguistische Standortbestimmung" (Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund, 1980).
- "Psychologische Reaktionen dem Esperanto gegenüber" (Vieno: Pro Esperanto, 1989, 2-a eld. 1992), 19 p.
- "Esperanto aus der Sicht eines Schriftstellers" (Vieno: Pro Esperanto, 1989), 19 p.

En Esperanto

- *, „Pri cel, far, dank kaj develop”. En: Monata Cirkulero de KCE, Nr. 71 (novembro 1975), p. 1-4.
- "Esperanto – Eŭropa aŭ azia lingvo?" (Esperanto-Dokumentoj, Roterdamo: UEA, 1977)
- *"Pri kripligo de etimologie korektaj formoj". En: Monata Cirkulero de KCE, Nr. 86 (junio 1977), p. 1-6.
- *"La okcidenta dialekto". En: Esperanto, 70 (1977), Nr. 7-8, Julio-Aŭgusto, p. 125-126.
- *"Esperanto, formo de humanismo". En: Internacia Pedagogia Revuo, 9 (1979), Nr. 1, p. 1-8.
- *"La psikologia rezisto al la lingvo internacia". En: Heroldo de Esperanto, 1980, Nr. 8 (1666); Nr. 9 (1667) (reproduktita en Rüdiger & Vilma Sindona Eichholz, red., Esperanto in the Modern World, Bailieboro, Ontario: Esperanto Press, 2-a eld., 1982, pp. 518-536).
- *"Pri grava eksperimento koncerne la instruadon de Esperanto". En: Monata Cirkulero, decembro 1981, Nr. 133, p. 2-3.

- * "Instruhoroj por studentoj". En: Barcsay, Zsusa (1982, Red.): Metodiko en la praktiko. Paderborn: Esperanto-Centro/ Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, p. 67-71.
- * "La familio Zamenhof kaj la internacia Cseh-Instituto". En: Monara Cirkulero, Nr. 152 (decembro 1983), p. 2-4; Nr. 153 (januaro 1984), p. 2-3.
- * "Kelkaj pripensoj pri la prosteza "e". En: Planlingvistiko 3 (1984), Nr. 11, p. 14-15.
- * "Ĉu Esperanto estas Di-Regna?" En: Espero Katolika 7-8/1984. Ankaŭ legebla sub http://www.esperokatolika.org/ek19811985/ek1984_0708.htm#2
- * "Veti pri Esperanto". En: der esperantist 23 (1987), Nr. 143 (3), p. 50-53.
- * "Esperanto, formo de humanismo". En: Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vol. II Esperantismo, La Laguna: Universidad de La Laguna, 1987, p. 571-578.
- * "Nacieco kaj Internacieco de Esperanto": En: Umeda, Yosimi (1987, Hrsg.): Plena Reporto "Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo" – kun aparta konsidero pri la lingva diverseco en la mondo. Internacia Simpozio honore al la Centjara Jubileo de Esperanto. Tokio. Japana Esperanto-Instituto, p. 179-184.
- "Psikologiaj reagoj al Esperanto" (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 26 E, Roterdamo: UEA, 1988, 14 p.)
- * represita en Fettes, Mark (1988, Hrsg.): Jubilea Jarcento de Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, p. 152-153; *represita en: Maitzen, Hans Michael/ Mayer, Herbert/ Tišljár, Zlatko (Hrsg.)(1994): Aktoj de Internacia Scienca Simpozio „Esperanto 100-jara“. Universitato de Vieno, 28.-30.10.1987. Wien: Pro Esperanto/Malibor: Interkulturo, p. 31-45.
- * "Socilingvistika fenomeno malfacile komprenebla". En: Ćolić, Senad (Hrsg. 1988): Sociaj aspektoj de la Esperanto-Movado. Sarajevo: Savez za esperanto BiH, p.34-37.
- * "Abunde kaj...fekunde". En: Literatura Foiro 19 (1988), Nr. 115, p. 13-19, 22.
- * "Esperanto: nekonata, miskonata". Paris: Universite Paris VIII – Vincennes a Saint Denis (Cours et Etudes de Linguistique Contrastive et Appliquée de Vincennes), 1988, 44 p.
- * "Pri la landnomoj". En: La Gazeto, 5 (1989), Nr. 25, p. 16-17.
- "La bona lingvo" (Vieno: Pro Esperanto/Budapest: Hungara Esperanto-Asocio; 1989; 2-a eld. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1997), 111 p.
- * "Babilado kun Claude Piron". En: Opus nigrum, Budapest, 4/1988, p. 13-15.
- "Esperanto el la vidpunkto de verkisto" (Vieno: Pro Esperanto, 1989, 2-a eldono:1992), 16 p.
- * Represo en: Maitzen, Hans Michael/ Mayer, Herbert/ Tišljár, Zlatko (Red.)(1994): Aktoj de Internacia Scienca Simpozio „Esperanto 100-jara“. Universitato de Vieno, 28.-30.10.1987. Wien: Pro Esperanto/Malibor: Interkulturo, p. 114-126.
- * "Rektaj kostoj de lingva komunikado ĉe UN". En: Heroldo de Esperanto, 13/1990, p. 1.
- * "La imago kaj la realeco". En: La Gazeto 7 (1992), Nr. 39, (dialogo), p. 2-4.
- * "Flankenŝovaj respondoj ne akcepteblas". En: Esperanto 85 (1992), Nr. 7-8, p. 130-131.
- * "Esperanto:ĉu fiaskis"? En: Dialogo, 1993, Nr. 45, p. 2-3.
- * "Esperanto – ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?" En: Studoj pri Esperanto. Pekino: Ĉina Esperanto- Eldonejo, 1993, p. 109-225.
- * "Perversaj efikoj de la nuna komunikad-sistemo". En: Heroldo de Esperanto 71 (1995), Nr. 13, p. 1,3; Nr. 14, p. 1, 3; represo : Sennacieca Revuo, Nova Serio, 1996, Nr. 124, p. 1-7.
- * "Kompara studo surterena". En: Selten, Reinhard (1997): La kostoj de la eŭroplingva (ne-) komunikado. Roma: "esperAnto" radikala aoscio, p. 24-37.
- * "Claude Piron/ Johán Valano. Bibliografio". En: Literatura Foiro 28 (1997), Nr. 168,p. 205-207.
- * "Kiel iu nacia edukprincipo influas esperanton". En: Koutny, Ilona/ Kovács, Márta (1997, Red.): Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto. Budapest: Steleto&ILEI, p. 81-92.
- * "Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de esperanto". En: Heroldo de Esperanto, Nr. 4-5/1998, p. 6; Nr. 6/1998, p. 3.
- * "Interesaj respondoj de Claude Piron": (Retpoŝte demandis kaj redaktis Hakan Lundberg, kun helpo de Henning von Rosen). En: *Asistilo: Religi-kompara revuo* (FR-09800 Balagué : ASISTI / "Foyer de culture internationale *Hejmoj*"), n-roj 24 kaj 25, aŭtuno 1999 kaj printempo 2000, respektive p. 12-14 kaj 6-8.

- *”Kien esperanto?”. En: Literatura Foiro 31 (2000), Nr. 186, p. 178-186.
- *”Tute normala progreso”. En: Esperanto 97 (2004), Nr. 2, p. 30-31; Nr. 3, p. 60-62.
- *”Kiaj perspektivoj jarcenton post la unua kongreso?”. En: Esperanto 98 (2005), Nr. 5, p.102-103; Nr. 7-8, p. 153, 158.
- *”Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto”. En: Pola Esperantisto 6/2006, p. 13-19; 1/2007, p. 19-33.

En la angla

- "Understanding among Africans: Linguistic isolation and linguistic communication" (Esperanto Documents, No 17 A, Roterdamo: UEA, 1979, reproduktita en Rüdiger & Vilma Sindona Eichholz, red., Esperanto in the Modern World, Bailieboro, Ontario: Esperanto Press, 2-a eld., 1982, pp. 282-296)
- (kun Humphrey Tonkin) "Translation in international organizations" (Esperanto Documents, No 32 A, Roterdamo: UEA, 1979, reproduktita en Rüdiger & Vilma Sindona Eichholz, red., Esperanto in the Modern World - Bailieboro, Ontario: Esperanto Press, 2-a eld., 1982, pp.208-235).
- "Esperanto: European or Asiatic Language?" (Esperanto Documents, No 22 A, Roterdamo: UEA, 1981, 31 p.).
- "The psychological resistance to the international language" (Bailieboro, Ontario: Esperanto Press, 1982).
- "Learning from Translation Mistakes" (in Dan Maxwell, Klaus Schubert kaj Toon Witkam, red., New Directions in Machine Translation, Dordrecht, Holland / Providence, R.I.: Foris Publications, 1988, p. 233-242).
- "Who are the speakers of Esperanto?" (in Klaus Schubert, red., Interlinguistics, n-ro 42 de la serio Trends in Linguistics - Studies and Monographs; Berlino, Novjorko: Mouton de Gruyter, 1989, pp. 157-172).
- "A few notes on the evolution of Esperanto" (in Klaus Schubert, red., Interlinguistics, n-ro 42 de la serio Trends in Linguistics - Studies and Monographs; Berlino, Novjorko: Mouton de Gruyter, 1989, pp. 129-142).
- *”Psychological reactions to Esperanto“. Esperanto Documents, 42 A, 1994, Rotterdam:Universala Esperanto-Asocio, 12 p.
- *”Comparative field study”. En: Selten, Reinhard (1994, Hrsg.): The costs of european linguistic (non)communication. Rom: “esperAnto” radikala aoscio, p. 25-39.
- *”Letter to an english poet”. En: Brita Esperantisto 9-10/1997, p. 148-151.
- *”Linguistic Communication. A Comparative Field Study”. Esperanto Document 46 A, 2000, Rotterdam:UEA, 22 p.

En la finna

- *”Esperantoon suhtautumisen psykologiaa”. Helsinki: Suomen esperanto-liitto, 16 p.

En la franca

- "Quelques réflexions sur l'introduction de la première langue étrangère à l'école primaire" (Educateur, 17 septembro 1976).
- "Pour une communication internationale de qualité: Mieux que la traduction automatique?" (Techniques d'instruction, 1977, 1, pp. 9-23).
- "Se comprendre entre Africains" (Documents sur l'espéranto, n-ro 5, Roterdamo: UEA, 1979).
- "Chanson et traduction: un exemple de la souplesse de l'espéranto" (Le Rotarien, n-ro 316, majo 1979, pp. 34-40).
- "Problèmes de communication linguistique aux Nations Unies et dans les organisations apparentées" (Language Problems and Language Planning, 1980, 4, 3 (fall), pp. 224-238, University of Texas Press).

- *"Moi, j'aime l'espéranto". En: Parallèles. Cahers de l'Ecole de Traduction et d'Interprétation. Genève, 1982, Nr. 5, p. 9-18.
- * "L'Espéranto: Langue européenne ou asiatique?" Documents sur l'Esperanto, 12 F, 1983, Rotterdam:UEA, 37 p.
- * "Culture et Esperanto". En: Franca Esperantisto, 51 (1983), Nr. 342.
- *"Chanson et traduction". In : L'Espéranto en Marche, 1983, Nr. 1, p. 3-6.
- "Culture et espéranto" (SAT-Amikaro - Objectif 87, n-ro 393, marto 1984).
- *"Réponses à certain questions sur L'espéranto". En: Franca esperantisto, 1984, Nr. 351 (mar.-avr.).
- "Contribution à l'étude des apports du yiddish à l'espéranto", (Jewish Language Review, 1985, 4, pp. 15-29).
- "Espéranto: la progression s'accélère" (SAT-Amikaro - Objectif 87, n-ro 417, aŭgusto-septembro 1986, p. VII-VIII).
- "L'espéranto vu sous l'angle psychopédagogique" (Education et Recherche, 1986, 8, 1, pp. 11-41).
- "L'espéranto, un goût bizarre?" (Documents sur l'espéranto, n-ro 24 F, Roterdamo: UEA, 1987, 18 p.).
- "Espéranto: l'image et la réalité" (Cours et Etudes de Linguistique contrastive et appliquée, n-ro 66, Parizo: Institut de Linguistique appliquée et de didactique des langues, Universitato de Parizo-8, 1987, 53 p.), *ankaŭ en: Chiti-Batelli, Andrea (1987, Red.): La comunicazione internazionale tra politica e glottodidattica, L'Esperanto, cento anni dopo. Milano: Mazarati Editore, p. 68-116.
- "Réponses à certaines questions sur l'espéranto" (Parizo: Unuiĝo franca por Esperanto)
- "Créativité et expression linguistique" (in Duc Goninaz, Michel, red. Etudes sur la langue internationale, Gent: AIMAV, 1987, pp. 145-153)
- "Miser sur l'espéranto" En: Revue française d' espéranto (Espéranto Actualités 1987, Nr. 5(379), p. 50-54, reproduktita en Le défi des langues, Parizo: L'Harmattan, 1994, pp. 199-204).
- "Espéranto: le point de vue d'un écrivain" (Le langage et l'homme, 1987, 22, 3, pp. 266-271)
- "Structures linguistiques et accusatif" (Revue française d'espéranto, 1990, novembro, n-ro 5, pp. 283-287), *Represo en: Riverego, Spring, Nr. 6/1991, p. 5-8.
- *"Considerations sur l'Esperanto". En: Bulletin européen (Roma), XLI (1991), p. 7-8, 11-14.
- "Un cas étonnant de masochisme social" (Action et Pensée, 1991, septembro, 19, pp. 51-79, franclingva pliampleksigo de n-ro 2; reproduktita en: Communication linguistique: A la recherche d'une dimension mondiale" Nr. 22 (Parizo: SAT, 1992, 55 pp.).
- "L'Europe: Au rebours du bon sens?" (Parizo: SAT-Amikaro, 1992).
- "A quand le bon sens dans la communication internationale?" (Carte Blanche, 1993, 8, januaro, pp. 4-5)
- *"Espéranto une langue sans frontières". En: Esperanto Actualités. Revue française d' espéranto, 1993, Nr. 3 (442), p. 118-127.
- "Et si l'on prenait les handicaps linguistiques au sérieux?" (La Revue Générale, 1993, 6-7, pp. 57-70).
- *"Les barrières psycholinguistiques envers des langues 'planifiées'". En: Regozini, Georg M. (1993, Red.): Le problème de la communication et des langues dans la Communauté Européene – A quel point une langue 'planifiée' pourrait-elle contribuer à sa solution?. Brüssel. Hans Seidel-Stiftung, p. 82-89.
- "Le défi des langues - Du gâchis au bon sens" (Parizo: L'Harmattan, 1994, 336 p.)
- "Une solution à étudier: l'espéranto" (en Canadian Centre for Linguistics Rights / Centre canadien des droits linguistiques. Vers un agenda linguistique: Regard futuriste sur les Nations Unies / Towards a language agenda: Futurist outlook on the United Nations, Ottawa: Universitato, Jura Fako, 1996, pp. 631-657)..
- "Plaidoyer pour l'espéranto" (La Revue de politique indépendante, 1996, 3-a kvaronjaro, n-ro 15, pp. 104-107).
- "Idées reçues: l'exemple du chinois et de l'espéranto" (en Marinette Matthey, red., Les langues et leurs images, Neuchâtel: Institut Romand de Recherche et de Doc. Pédagogiques, 1997, pp. 141-145).
- *"Communication linguistique: Étude comparative fait sur le terrain". En: Language Problems & Language Planning 26 (2002), Nr. 1, p. 23-50.

En la itala

- *"L'esperanto: lingua europea o asiatica?". En: L'esperanto, Milano, 1978, Quaderni K5, 23 p.
- "Esperanto: l'immagine e la realtà" (reproduktita en Andrea Chiti-Batelli, red., La comunicazione internazionale tra politica e glottodidattica, Milano: Marzorati, 1987, pp. 68-116)
- "Alcuni riflessioni sull'introduzione della prima lingua straniera nella scuola elementare" (Scuola ticinese, 1981, 92, agosto-settembre)
- *"L'esperanto considerat dal punto di vista psicopedagogico". En: Esperanto: una concreta esperienza di educatione internazionale. Atti del 55. Congresso Italiano di Esperanto. S. Pellegrino Terme (BG), 8-15- settembre 1984. Milano: Federazione Esperantista Italiana, 1988, p. 35-51.
- "A proposito del trattato di Maastricht - Una deplorable lacuna" (L'Esperanto - Revuo de Itala Esperanto-Federacio - 1992, 7-8, pp. 13-18).
- "Effetti perversi dell'attuale sistema mondiale di comunicazione" (Il Dibattito Federalista, 1995, n-ro 3/4, pp. 20-25).
- *" Il rifiuto della ragione Il problema linguistico nelle istituzioni della comunità europea". En: Chiti-Batelli, Andrea (1995, Eld.): Quale "lingua perfetta"? Manduria-Bari-Roma: Lacaíta, p. 25-35.
- *"Studio comparativo sul campo". En: Selten, Reinhard (1997): I costi della (non) comunicazione linguistica europea. Roma: "esperAnto" radikala asocio, p. 24-38.
- *"Il diritto alla comunicazione". En: l'esperanto (Roma) 30 (1999), Nr. 8, p. 4-13.
- *"Lettera di Claude Piron al prof. Pier Marco Bertinetto". En: l'esperanto 34 (2003), Nr. 9 (Numero speciale 2003: Como parlarsi tra Europei), p. 19-29.

En la japana

(D-ro KIMURA Goro kaj OKUWAKI Toshiomi informis min pri jenaj tekstoj de Claude Piron tradukitaj en la japanan):

- *"Esperantogo no icisokutei: yôroppago ka aziago ka, Nagoja Esperanto-Centro, 1981[traduko de "Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?" (Esperanto-Dokumentoj, nova serio n-ro 10E, 1977)] trad. MIZUNO Yosiaki.
- *" Japana traduko (p. 75-81) de "Nacieco kaj Internacieco de Esperanto", en: Internacia Simpozio honore al la Centjara Jubileo de Esperanto "Socilingvistikaj Aspektoj de la Internacia Lingvo - kun aparta konsidero pri la lingva diverseco en la mondo -" Organizantoj: UEA kaj JEI, Plena raporto eldonita en 1987.
- *"stranga esperantisto" (el: "La Gazeto" n-ro 78, 31.Okt.1998) en japana traduko de TAKANO Haruki en: "Nova Vojo" junio 1999
- * "Interesaj respondoj de Claude Piron"[intervjuo de Hokan Lundberg al Piron] (el: "Asistilo" aŭgusto 1999). Japana traduko de TANAKO, Haruki en: "Nova Vojo" marto 2000.

En la kroata

- *"Neka razmišljanja izazvana dvama jezičnim izvještajima UNO". En: RašićNikola (1986, Red.): Jezični imperijalizam. Zagreb: Savez za esperanto. Hrvatske, p. 14-22

En la nederlanda

- *"Esperanto: Europese of Aziatische taal?" 1986, Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 32 p.
- * Psychologische reacties op het Esperanto". Antwerpen: Vlaamse Esperantobond, 20 p.

5.3 Aliaj publikaĵoj

Romanoj (Pseŭdonimo *Johán Valano*)

- "Ĉu vi kuiras ĉine?" (Aabyhoj: Dansk Esperanto-Forlag, 1976; 2-a eld. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 1996)
- "Ĉu li bremsis sufiĉe?" (Antverpeno, La Laguna: TK/Stafeto, 1978)
- "Ĉu li venis trakosme?" (Antverpeno, La Laguna: TK/Stafeto, 1980)
- "Ĉu ni kunvenis vane?" (Antverpeno, La Laguna: TK/Stafeto, 1982)
- "Ili kaptis Elzan" (Chapecó: Fonto, 1985)
- "Tien" (Vieno: IEM, 1997)

Romanetoj facillingvaj (kiel *Claude Piron*)

- "Gerda malaperis!" (Chapecó: Fonto, 1983)
- *"Gerda malaperis. Unterrichtsmaterial für Esperanto-Sprachkurse. Wortliste für den deutschen Sprachraum. Deutsche Bearbeitung von Horst Gruner, Thomas Pusch". Bonn: Deutsche Esperanto-Jugend e.V./ Deutscher Esperanto-Bund e.V., 38 p.
- "Dankon, amiko" (Vieno: Pro Esperanto, 1990)
- "La kisa malsano" (Vieno: Pro Esperanto, 1991, 2-a eld. 2000)

Kolektoj de noveloj (Pseŭdonimo *Johán Valano*)

- "Lasu min paroli plu" (Chapecó: Fonto, 1984)
- "Ĉu rakonti novele?" (Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1986)
- "Vere aŭ Fantazie" (Chapecó: Fonto, 1989), 216 p.

Diversaĵoj

Lurso pri psikologio:

- "Kiel personeco sin strukturis" (Lieĝo: SUK, 1978)

Kolekto de poemoj (Pseŭdonimo: *Johán Valano*)

- "Malmalice" (Pisa/Kuopio: La Nuova Frontiera / Literatura Foiro, 1977 ; 2-a eldono ; Vieno: IEM, 2001)

Muzika kasedo (Pseudonimo: *Johán Valano*)

- "Frandu Piron" (Ĝenevo: LF-Koop, 1982)

6 Magomet Ismailoviĉ Isaev – 80-jara

Detlev Blanke

Kun malfruo ni eksciis pri la 80-a naskiĝtago de la grava rusa interlingvisto, *prof. d-ro Magomet Ismailoviĉ Isaev*, kiun li festis jam la 5-an de marto 2008 seinen 80. Geburtstag feierte⁶. La jubileulo ludis gravan rolon por la evoluigo de interlingvistiko en Sovetunio ĝis proksimume 1990. Ekde 1979 li estis prezidanto de "Asocio de Sovertiaj Esperantistoj" (ASE), funkcio ne ĉiam facila por homo, kiu estas sciencisto kaj devas sekvi ordonojn de neinformitaj kaj ofte kontraŭesperantaj sovertiaj funkciuloj.

⁶ Mi atentigas pri la ampleksa biografia artikolo de Isaev en Rusia Esperanto Gazeto (REGO), Nr. 1 (14), februaro 2003, p. 3-4; Nr. 2 (15), aprilo 2003, p. 7-10.

Sed laŭ miaj observoj li faris la plej bonan por Esperanto en malfacila tempo. Krome substrekendas lia helpo al nesovetiaj esperantistoj kaj sciencistoj, inter kiuj mi mem kalkulas min. En la reto, aperis ampleksa ruslingva omaĝa artikolo de la rusa lingvisto *Bibo Zaĥilov* http://osradio.ru/2008/03/06/uchenyj_s_mirovym_imenem/ 10.4.2008). La germanan tradukon (de Cornelia Mannewitz) mi publikis en "Interlinguistische Informationen" 17 (2008) N-ro 66-67 (1-2/2008), p. 21-22.

Sekvas la ĉefaj interlingvistikaj publikaĵoj de Magomet Isaev:

Isaev, Magomet I. (1974): Esperanto – jazyk budoušĉego? En: Technika i nauka (Moskva), Nr. 5, p. 18-19 (Esperanto – la lingvo de la estonteco?).

- (1975a): Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko. En: der esperantist, Nr. 71 (3), p. 11-15.
- (1975b): Diskussion mit dem Leser. En: Neue Zeit, Moskau, Nr. 44, p. 30-31 (Diskuto kun la legantoj pri Esperanto).
- (1976a, Red.): Problemy interlingvistiki. (Problemoj de interlingvistiko). Moskva: Nauka, 160 p.
- (1976b): E.A. Bokarev i interlingvistika. En: Isaev 1976a, p. 5-11. (E.A. Bokarev kaj interlingvistiko)
- (1976c): Problema iskusstvennogo jazyka meždunarodnogo obŝĉeniĵa. En: Isaev 1976a, p. 26-34 (Problemoj de artefarita internacia komunika lingvo)
- (1976d): Wie überwindet man Sprachbarrieren? (Kiel oni superas lingvajn barilojn?) En: Sowjetunion, Moskau, Nr. 9, p. 26-27.
- (1977a): K probleme vspomogatel'nogo iskusstvennogo jazyka v èpochu nauĉno-techničeskoj revol-jucii. En: Beloded, I. K. /Deŝeriev, Ju. D. (Red.): Nauĉno-techničeskaja revoljucija i funkcionirovanie jazykov mira. Moskva: Nauka, p. 44-48. (Pri la problemoj de artefarita helplingvo en la epoko de la scienc-teknika revolucio)
- (1977b): Pri la lingvo de l'estonto. En: Blanke, Detlev (Red.) Esperanto. Lingvo, movado, instruado. Berlin: Kulturbund der DDR/Zentraler Arbeitskreis Esperanto, p. 1-12.
- (1978a): Problema mižnarodnoji dopomižnoji movy na suĉasnomu etapi. En: Movosnavstvo, Kiev, Nr. 5, p. 3-11 (La problemoj de internacia helplingvo en la nuntempa epoko, ukrainlingva)
- (1979): Pri la stato kaj pliefikigo de laboro de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigo de iliaj internaciaj ligoj. En: der esperantist, Nr. 96 (4), p. 6-8.
- (1981): Jazyk Esperanto. (La lingvo Esperanto) Moskva: Nauka, 85 p.
- (1987a): Meždunarodnyj vspomogatel'nyj jazyk Esperanto: voprosy teorii i praktiki (k stoletiju sozdaniĵa i razvitija). En: Voprosy jazykoznanija, Moskva, Nr. 4, p. 83-94 (La internacia helplingvo Esperanto. Problemoj de teorio kaj praktiko. Okaze de la centjariĝo de ĝia kreiĝo kaj evoluo)
- (1987b): Esperanto. Tallin: Eesti Raat, 70 p.
- (1991a, Red.): Problemy meždunarodnogo vspomogatel'nogo jazyka. Moskva: Nauka, 262 P. (Problemoj de internacia helplingvo).
- (1991b): Stoletie planovogo vspomogatel'nogo jazyka Esperanto (Ideja, realizacija, funkcionirovanie). En: Isaev 1991a, p. 4-24 (100 jaroj da planita helplingvo Esperanto. ideo, realigo, funkcio)

7 Novaj kaj malnovaj libroj en la reto

Brokantejoj: www.zvab.com, www.abebooks.de, www.prolibri.com, www.marelibri.com.

Pri planlingvoj ankaŭ kontrolu: <http://books.google.com/books> (klaku 'Esperanto' ktp.). Pri novaj interlingvistikaj libroj kaj recenzoj vidu: www.plansprachen.ch aŭ www.planlingvoj.ch (Tre bona retejo de Andreas Künzli, Svisio).

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snafu.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retroŝto aŭ sur diskedo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantoj el ĉiuj regionoj de la mondo bonvenas.
